

revuo

esperanto

julio/aŭgusto 1966

59-a jaro

n-ro 728 (7-8)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)



ESPERANTO

revuo internacia

Fondita en 1904 de H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telef.: (010) 23 27 88 Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1966): 15,— gld. (kun membreco kaj jarlibro 20,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj:

0,20 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 83 landoj.

Estraro de U.E.A.:

Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj kongresoj, 6653 Blieskastel, Schlossbergstr. 51, Germanujo.

D-ro A. Albault, estrarano pri kulturaj aferoj, 32 avenue Etienne Billières, 31-Toulouse-03, Francujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 De Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro H. R. Tonkin, Dept. of English, University of Pennsylvania, Philadelphia, Pa. 19104, Usono.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7. 8057 Zürich, Svislando.

enhavo

- 121 Kion atingis la informaj fakoj en 1965? (Becker)
- 122 Turismo kaj kulturo (Unger)
- 123 Antikvaj skribsistemoj en Afriko (Olderogge)
- 126 Esperanto ekde la naskiĝo (Schleicher)
- 127 Preskaŭ finiĝis la subskribo-kampanjo
- 128 La pereanta lingvo aina (Matuba)
- 130 "Omleto de riĉuloj" (Alejhem/Ginz)
Nekrologoj Girolodi, Lundquist, Racine, Sun
- 131 "Plori, plori, plori" (Ady/Kalocsay)
- 132 Pri unueca prononcado (leteroj)
- 133 Leteroj
Respondoj al kontraŭ-Esperantaj paroloj: 2
- 134 Recenzoj
Ricevitaj eldonaĵoj
- 135 Mallongaj novaĵoj
- 136 La Juna Vivo
- 137 Esperanto en radio
- 138 En la grupoj
Memoriga kalendaro
Oficiala informilo n-ro 392
- 140 Anoncetoj

kovrila bildo

Vidaĵo de Ako, apud Hajfa, Israelo (Foto: Israela Nacia Turisma Oficejo/Michael Maor)

bildojn liveris

- 124 Kuriero de Unesko
- 125 Unesco/P.A.Pittet
- 130 Zinovij Tolkaĉov
- 131 Ferenc Lajos
- 135 Oswaldo Naghettini
- 138 "Welt auf Reisen"

**oficiala organo
de universala
esperanto-asocio**

(en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)

esperanto
juli-aŭg. 1966

Multaj el niaj legantoj ĉe trafolumado de ĉi tiu numero de nia revuo vane serĉos la tabelan trarigardon pri la informa laboro en la jaro 1965. Ĝi ne aperas ĉifoje pro pluraj kaŭzoj. Bonvolu akcepti anstataŭe kelkajn rimarkojn pri la informado ĝenerale kaj pri la ricevita materialo. Ĝuste en ĉi tiu monato eble estas konvene unue atentigi pri grava evento el la historio de nia informado. En kunveno de la reprezentantoj de la Informaj Fakoj en Frostavallen, Svedujo, estis akceptita nia Principaro de Informado pri la Internacia Lingvo la 30-an de julio 1956, do antaŭ 10 jaroj.

Siatempe estis faritaj grandaj streĉoj por vaste diskonigi ĝin kaj apliki ĝin ĉie en nia informado. Tamen bedaŭrinde tiu ĉi grava principaro ne estas tiel vaste konata kaj aplikata, kiel ĝi devus esti. Por doni pli grandan disvastigon, ĝi aperis denove en la jarlibro 1965. En la nova broŝuro de UEA "La Esperanto-Societo" estas pluraj atentigoj pri ĝi.

En la Seminario por Gvidantoj organizita de TEJO mi dediĉis ĉefan atenton de mia prelego al apliko de la Principaro en la porjunulara informado. En la kunveno de la reprezentantoj de la Informaj Fakoj en Budapeŝto la 2-a punkto de la tagordo traktos la Principaron de Frostavallen. Krom tio estas la intenco de la Estraro de UEA, en ĉi tiu revuo publikigi artikolojn pri la diversaj punktoj de la Principaro. Mi estas firme konvinkita, ke, se ni pli intense agas de nun laŭ tiu nia baza principaro pri informado, ni povos plibonigi ankoraŭ la akiritajn poziciojn sekve de la JIK.

Kiel okazas ĉiam, ne ĉiuj landoj, malgraŭ admonoj, respondis al la demandaro. Tamen el kelkaj landoj mi sukcesis havi nekompletajn informojn pri bonaj rezultoj ofte en formo de senditaj artikoloj aŭ malgrandaj raportetoj. Tion mi ŝuldas al la sindona laboro de unuopaj esperantistoj aŭ de lokaj grupoj kun bona informa fako, kvankam ŝajne la landa informa fako ne aktivas.

Komparante la atingojn laŭ la ricevita materialo, mi povas distingi plurajn grupojn de fontoj: 1) a) Respondoj ricevita de bone laborantaj landaj informaj fakoj. Inter ili kiel ĉiam elstaras Germanujo, kiu sendis aldone dek paĝojn kun tre utilaj informoj, kaj Francujo, kiu havas specialan gazetaran ataŝeon, reton de regionaj kaj lokaj respondeculoj, kaj kiu intencas organizi kunvenojn por tiuj respondeculoj, dediĉante plenan atenton al la Principaro de Frostavallen "sola efika ĉarto por la informa agado".

La vico de aliaj bonaj respondoj iras tra la tuta alfabeto de la belga, kiu laboras en du lingvoj, tra la modele laboranta bulgara ĝis la

plej moderne agantaj fakoj de Svedujo kaj Usono. Kompreneble aparte bonaj estas la kondiĉoj en Hungarujo, Israelo kaj Hispanujo pro la aldone funkcia Kongresa Gazetara Servo. Tamen el Japanujo mi bedaŭrinde ĝis nun nur ricevis informon de unu loka informa fako. Kvankam kelkaj landoj skribis, ke subskribkolektado kaj aliaj aranĝoj de la JIK ne donis tre bonajn efikojn (rapida rigardo evidentigis, ke en tiuj landoj oni apenaŭ kolektis subskribojn) tamen oni ĝenerale agnoskis, ke estis pli favoraj kondiĉoj. El Hungarujo oni skribis "Per ĝi ni penetris en vastajn popoltavolojn."

b) Alia grupo de respondoj estas tutlandaj pri unu parto, ĉefe pri aperintaj artikoloj.

c) Senditaj kompletaj raportoj de grupoj pri informa laboro en unu loko.

ĉ) Similaj raportoj de unuopaj personoj.

d) Gazeteltondaĵoj, kiuj tamen permesas ankoraŭ konkludi, ke en la koncerna lando oni informas diversspece pri Esperanto.

2) Raportoj de fakaj organizaĵoj kiuj kompletigas iom la bildon kaj estas ĉiam bonvenaj.

Oni povas facile supozi, ke, se mi kombinas tiel diversajn elementojn en unu tabelo, mi ricevas tute neadekvatan bildon. Tiel devige okazis en la lasta jaro. Kion fari? Kiel prave atentigis pluraj bonaj helpantoj, publikigo de tia tabelo nur havas sencon, se ĝi respegulas almenaŭ la proksimuman staton de niaj tiurilataj atingoj.

Jam ofte ni petis la landajn asociojn fondi informajn fakojn, kiuj siavice ankaŭ okupiĝu pri organizado de bonaj lokaj informaj fakoj. En kelkaj landoj tio bone funkcias. Kial ne en la aliaj foje provi la inversan vojon? Ĉiu loka grupo fondu informan fakon. Ĉiuj lokaj informaj fakoj kune provu organizi kiel eble plej efike laborantan landan informan fakon, kiu nepre estu en bonaj rilatoj kun la informa fako de UEA, sekvu ties konsilojn kaj ankaŭ transdonu ilin kun propraj al la lokaj informaj fakoj kaj absolute ne forgesu post la fino de la jaro respondi al la Demandaro.

Günther Becker
Estrarano pri informado

Resumaj ciferoj pri informado en 1965. Paren-teze aperas la ciferoj de 1964: Laŭ la 46 (33) respondoj de landaj asocioj aŭ kunlaborantoj aperis 3522 (2661) artikoloj kaj 8090 (9772) informoj en nacilingvaj gazetoj. 1169 (855) prelegojn ĉeestis 61 573 (66 467) personoj. Okazis 500 (614) nacilingvaj radio- aŭ TV-prelegoj. 156 (149) ekspoziciojn vizitis 378 784 (573 836) personoj. Estis disdonitaj 443 281 (437 469) informiloj.



Hj. Unger

TURISMO KAJ KULTURO

U.I.O.O.T. (Unuiĝo Internacia de Oficialaj Organizaĵoj por Turismo), kiun prezidas s-ro Arthur Haulot, ĝenerala komisaro de la belga turismo, deklaris 1967 "Jaro de la Internacia Turismo". U.I.O.O.T., en kiu 95 landoj estas reprezentataj, havas konsultajn rilatojn kun Unesko. Jen artikolo, kiu aperis en "World Travel / Tourisme Mondial", oficiala organo de U.I.O.O.T., kaj kies aŭtoro estas d-ro Hj. Unger, prezidanto de la Svisa Unuiĝo de Turismaj Ĵurnalistoj, membro de UEA.

Vera turismo, inda je tiu nomo, estas tiu, kiu servas ne nur por distriĝo kaj malstreĉiĝo sed ankaŭ por edukado kaj por interpopola kompreno. Tiun koncepton idealan defendas granda nombro da Turismaj Komisaroj kaj Direktoroj, kiuj komprenas, ke turismo povus iam esti rimedo de edukado kaj paco. Sed Pacon neniam alportos vojaĝado per si mem, t.e. la nura translokiĝado. Por kontribui al interpopola kompreno, turismo devas esti ligita al kulturaj valoroj, ĉar ili donas al ĝi realan kaj profundan signifon, komprenigante ankaŭ la historiajn, ekonomiajn k.a. interrilatojn kaj tiel helpante la interproksimiĝon de homoj kaj popoloj.

Germana sociologo, kiu serioze okupiĝis pri la demando kaj enketis iom vaste, tamen opinias tiun lukton por "inteligenta turismo" jam perdita. Li deklaris, ke ĉiuj vojaĝas por imponi ĉe siaj najbaroj kaj por pliigi sian socian prestiĝon. Laŭ li, la hotel-etikedoj sur valizoj, la blazonoj gluitaj sur aŭtoj kaj la amasekspedo de ilustritaj poŝtkartoj al ĉiuj amikoj kaj konatoj konsistigas por multaj turistoj la plej gravan elementon de vojaĝo. Anstataŭ pli bone konatiĝi kun la mondo, la moderna turisto rigardas ĝin nur tra la fenestro de aŭtobuso aŭ tra la kadreto de fotilo. Certe tiu sociologo estas pesimisma, sed oni ne rajtas riproĉi, ke li tro fantazias. La esenca parto de liaj kritikoj ne estas elpenŝaĵo.

La amasa turismo estas fenomeno, kiu kreis multajn — precipe psikologiajn — problemojn. Se 10 000 turistoj, ekzemple, mobiliziĝas por trovi izolitan lokon, tiu loko ne plu estos izolita. Se milionoj da libertempantoj alpuŝiĝas al la samaj strandoj, montoj kaj valoj, kian ripozon aŭ malstreĉiĝon ili povas tie trovi?

La amas-epoko, en kiu ni vivas, eksimilas al la epoko de popol-migrado, kaj necesas trovi ian rimedon por konduki tiun migradon al bona fino.

Ni devas rekoni, ke naĝi en kvieta maro kaj amasigi sin unu apud la aliaj por bruniĝi sur la strando estas fine nur la lasta stacio de fervoja aŭ aviadila vojaĝo. Oni "alvenas" por preni sian "lokon sub la suno", same kiel miloj da aliaj turistoj, kiuj invadas la saman

lokon. Tion oni ja povus same bone fari ĉe si, en la propra lando, se nur tie troviĝus la maro kaj la varma suno...

Jes, la granda grego, la amas-homo de la nuna tempo ĝenerale vojaĝas nur por translokiĝi. Nur tiel! Jen sufiĉe malĝojiga fakto pri nia epoko, en kiu oni ne plu trovas tempon por vere ripozi, por ĝui la etajn aferojn de la vivo, por partopreni la kulturen vivon kaj por inteligente aranĝi sian liberan tempon. Ne nur mankis al ni pedagogia gvido, sed la laboristaj sindikatoj kaj aliaj profesiaj organizaĵoj, kiuj luktis por plialtigo de salajroj kaj la kvin-taga laborsemajno, ne donas al la homoj sub favoraj cirkonstancoj kaj kun mono en la poŝo bonan formulon por la utiligo de tiu mono. Oni vojaĝas tute senbride, kaj, per amasa kolektiva turismo, la junularo fariĝas "duon-kulturita", sed ĝi ne havas apartan celon aŭ stilon nek ian ajn ideon pri vere inteligenta turismo.

Ni prenu nur unu ekzemplon: vizito al iu strando kun "abunde da suno" havas malmultan sencon, se oni ne interesiĝas pri kontakto kun la popolo, kies gasto oni estas. Tre ofte tian kontakton malebligas la lingvaj baroj, kiujn Esperanto celas forigi, sed ne estas maleble almenaŭ iom ekskursi en la ĉirkaŭaĵo, informiĝi pri la historio de la plej proksima urbo, viziti tie kelkajn muzeojn kaj tiel vastigi sian vidpunkton. Tamen tia turismo estas afero individua, kaj ne ekzistas universala formulo. Vojaĝante en fremdaj landoj, ĉiu devus senti sin kvazaŭ dua Kristoforo Kolombo, kun senfina scivolo, preta malkovri nekonitaĵojn kaj mediti pri ili.

Vojaĝon oni devus entrepreni kun la intenco interesiĝi pri la loĝantoj de la vizitota regiono, admiri ĝiajn artajn trezorojn kaj kuriozaĵojn, observi ĝiajn morojn kaj kutimojn, viziti restoracieton uzatan ĉefe de la landanoj mem... nur tiel la vojaĝo estas bonefika kaj prezentas ian kulturen valoron. Ni ne moku la homojn, kiuj iras tra la urbo "kun gvidlibro en la mano". Ili ja scias, pro kio ili vojaĝas. Por ili la mono elspezita por gvidlibro neniel estas malŝparita. Ili konatiĝas kun fremdaj popoloj, kun ties monumentoj, ties kutimoj, kaj reportas hejmen impresojn, kiuj riĉigas iliajn mensojn por la tuta vivo.

ANTIKAJ SKRIBSISTEMOJ EN AFRIKO

Dimitri A.
Olderogge

Apenaŭ eblas tro alte taksi la gravecon de skribado en la homa historio. Skribado ebligis transdonadi de unu generacio al alia la akiritan scion.

La hieroglifa skribsistemo, kiun disvolvis la egiptoj dum la kvara jarmilo a.K., servis kiel bazo por la alfabetoj, kiuj poste ekestis ĉe Mediteraneo kaj en Hindujo. Aliflanke, la hieroglifaj skriboj de orientaziaj popoloj — ĉinoj, koreoj, japanoj — ŝajne evoluis sendepende de la mediteraneaj kulturoj. La samon oni rajtas diri pri la skribo de amerikaj popoloj, precipe de la majoj.

Unu el la plej antikvaj skribsistemoj, la hieroglifa skribo de antikva Egiptujo, ekestis en Afriko (en la Nila valo), sed ĝi ne influis la kreon de skribsistemoj ĉe aliaj afrikaj popoloj; sola escepto estas la skribo de la antikva nubia regno Meroe (600 a.K. ĝis 400 p.K.), kiu evidente rezultis el egipta influo.


Pro tio oni ofte supozas, ke la popoloj de Sudano kaj tropika Afriko neniam disvolvis proprajn skribojn. Estas vero, ke la vaja popolo de Liberio inventis skribsistemon frue en la 19-a jarcento, kaj same faris la bamumoj de Kameruno en la 20-a jarcento, sed tiojn oni opiniis esceptoj. Oni ankaŭ asertis kiel tute konkretan fakton, ke ambaŭ sistemoj ekestis sub influo aŭ de eŭropaj aŭ de arabaj

skriboj. Sed ĉu tio estas vera? Ĉu estas kredeble, ke la afrikaj popoloj, malgraŭ sia originala, propre kreita kulturo, neniam atingis stadion, en kiu ili inventus ian skribsistemon?

Kiam portugaloj maristoj unuafoje atingis la okcidentan bordon de Afriko, jam ekzistis ŝtatoj laŭ la tuta longo de la marbordo de Supra Gvineo. Kontraŭ la unuaj eŭropaj karaveloj* la lokaj regantoj sendis grandajn flotojn da ŝipoj, el kiuj kelkaj kapablis porti centon da homoj. Jam nur tiu fakto montras, ke la portugaloj trovis ĉe la okcidenta bordo de Afriko popolojn, kiuj jam atingis altan kultur-nivelon. Se pri tio restas duboj, ili tuj dissolviĝas, se oni nur pensas pri la antikvaj bronzaĵoj kaj plenaj skulptaĵoj, kiujn produktis artistoj de la popoloj benina kaj joruba.

Oni certe povus supozi, ke la popoloj de la dahomea, joruba kaj benina reĝlandoj havis iam siajn proprajn skribsistemojn. Tio ŝajnas eĉ tre kredebla, ĉar la ŝtato certe bezonis iel registri la ricevajn tributojn kaj pagendajn impostojn kaj ricevi raportojn pri la stato de la armeo. Ĝi ankaŭ bezonis eldoni dekretojn kaj instrukciojn. Tamen la aferon ankoraŭ neniu esploris.

Plej konataj inter la skribsistemoj de la Gvineo Marbordo estas tiuj de la vajoj kaj



esperanto
juli-aŭg. 1966



Rejo Njoja de Kameruno instruis mem sian nove-inventitan skribsistemon al la nobeloj.

bamumoj. La vajan skribon malkovris en 1849 S. W. Külle, kiu ricevis la impreson, ke en Bandakoro ĉiuj plenaĝaj viroj sciis iagrade legi kaj skribi, kaj ke en aliaj vilaĝoj ĉiam troviĝis kelkaj, kiuj sciis legi la indiĝenan skribon. En 1834 (do ankoraŭ pli frue, ol Külle) la usona afrikologo Oric Bates notis: "la vajoj skribis abunde".

Silabaj skribsistemoj devenas el bildaj simboloj, kaj la "invento" de la vaja skribo fare de Momolu Doalu Bukele kun kelkaj helpantoj konsistis en tio, ke li elektis taŭgajn simbolojn kaj aranĝis ilin en precize difinita sistemo. Momolu Massakŭa, liberia konsulo en Britujo, rakontis, ke la vajoj dissendis novaĵojn — pri subita atako de malamikoj, pri la rezultoj de bataloj kaj aliaj eventoj — per bildoskribaĵoj sur arboŝelaj strioj.

Sub influo de la vaja skribo, najbaraj triboj, kompreninte ĝiajn principojn, rapide disvolvis proprajn sistemojn. Ni jam scias, ke similaj skribsistemoj ekzistas ĉe la popoloj Mende, Bassa, Gerze (Kpelle) kaj Toma (Loma).

La historio de la bamuma skribo estas bone konata. Njoja, reĝo de la bamumoj, konstruis tiun sistemon el simboloj jam antaŭ li uzataj kaj delonge konataj sur la stepoj de Kameruno. Antaŭ sia morto Njoja eĉ kvarfoje reformis la bamuman skribon por doni al ĝi pli sistemecan formon.

Kaj la vaja kaj la bamuma skriboj do ekestis per sistemigo de pli antikvaj simboloj. Tiuj lastaj ne postrestis, ĉar ili estis skribitaj sur putremaj materialoj — ligno kaj arboŝeloj — kaj ili ne longe konserviĝis en la malseka tropika klimato de Okcidenta Afriko.

Laŭ mia opinio, ankaŭ en Supra Gvineo ekzistis dum longa tempo io simila al skribsistemo. Tiun teorion mi bazas sur jenaj faktoj.

Inter la atributoj de la reĝoj de Dahomeo

estis ceremonia hakilo kun ornamita klingo. Tiajn hakilojn oni povis "legi", ĉar ĉiu el ili havis sian apartan signifon. La reĝo Takdonu aŭ Dakodonu (1625-1650) havis hakilon tre strange ornamitan. Laŭ A. Le Herissé, franca klerulo, kiu studis la historion de Dahomeo, la klingon oni povis jene legi: supre troviĝis simbolo de siliko — 'da'; malsupre aperis bildo de la tero — 'ko' — kun truo — 'donu'; kune tiuj prezentis la nomon 'Dakodonu'.

La dahomeaj amikoj de Le Herissé prezentis al li hakilon, kiu simbolis lian nomon. Sur la klingo aperis speco de arbo kun folioj (ama) ligitaj per ŝnuro (kan) kaj kun spacoj inter la folioj (bijo). Tion oni legis kiel 'nmakambijo', t.e. 'ne gravas, ne necesas'. Tio estis la nomo, kiun donis al Le Herissé liaj dahomeaj amikoj, ĉar li tiel ofte ripetis tiun vorton.

Tiuj ekzemploj montras, ke la popolo de Dahomeo antaŭ longe elpensis la principojn de hieroglifa skribo, sed ĝi ne konserviĝis simple pro tio, ke la materialoj uzataj ne estis daŭremaj.

Malpli evoluintajn skribsistemojn oni trovas ankaŭ sur la muroj de la dahomeaj palacoj. Ili forte similas la hieroglifojn de antikva Egiptujo, ekzemple tiujn de Narmer kaj aliaj urboj, kie la fruaj formoj de kartuŝo enhavis tiel bildoskribaĵojn kiel hieroglifojn. La egipta faraono aperis kiel akcipitro detruanta urbo-murojn per klingo inter la ungoj, aŭ foje kiel virbovo tretanta homon aŭ detruanta muron per siaj kornoj.

Similan karakteron havas la reliefoj sur dahomeaj palaco-muroj, montrantaj la reĝojn de Dahomeo kiel elefantoj aŭ rabobirdoj, kiuj dispecigas siajn malamikojn. Tiel en Dahomeo kiel en antikva Egiptujo ni trovas la plej fruajn stadiojn en la evoluo de skribsistemo.

Estas hodiaŭ malfacile konstati, ĉu ekzistis vere ia skribsistemo en la 16-a jarcento sur la

teritorio, kiu nun nomiĝas Rodezio. En la Nacia Muzeo en Bulaŭajo troviĝas manuskripta raporto verkita de Blake Thomson, unu el la esplorintoj de tiu regiono. Ĝi citas la aserton de iu tiea loĝanto, nomata Lino, laŭ kiu la popolo Njungŭe, kiu loĝis sur la bordoj de Zambezo, iam posedis manuskriptojn skribitajn sur feloj. Oni konservis ilin en la templo de Murenga kaj kopiis ilin de tempo al tempo, kiam la ledο fendiĝis. La kopiistoj prove imitis la simbolojn, kvankam ili ne sciis ilian signifon. Tre bedaŭrinde, la raporto de Blake Thomson kaj la kopioj de simboloj, konservataj en tiu sama muzeo, ankoraŭ ne estas eldonitaj.

La popoloj de Sudano kaj Orienta Afriko troviĝis sub influo de araba kulturo kaj islamo, kaj ili kreis proprajn alfabetojn surbaze de la araba. Same kiel la araba alfabeto servis en adaptita formo al la bezonoj de la turka kaj persa lingvoj, tiel ankaŭ multaj afrikaj popoloj ekskribis siajn lingvojn per arabaj literoj. Inter ili menciindaj estas la ŝuahila, kun riĉa literaturo, kaj la lingvoj de Okcidenta Sudano: la haŭsa, fulbea, kanuria, mandinga k.a. Ni ankaŭ ne forgesu la skribon de Etiopujo, kies tute apartaj formoj estis ellaboritaj frue en la kristana erao el la sudarabia Sabea skribo.

En kristana Nubio, la antikva nubia skribsistemo ekestis en la 10-a jarcento sub influo de la kopta skribo. Neniu eĉ imagis, ke ekzistas tia skribo, ĝis 1906, kiam aperis kelkaj ne-

konataj skribaĵoj inter manuskriptoj arabaj kaj koptaj, kiujn la Berlina Muzeo ricevis el Egiptujo. Posta studo pruvis, ke ili estas en la antikva nubia lingvo, kio signifas, ke ili estas la plej malnovaj skribaj dokumentoj en iu ajn pure afrika lingvo.


Nun, kiam la plimulto de afrikaj popoloj jam liberigis sin el kolonia dependeco, la problemο de skribado de afrikaj lingvoj fariĝis pli urĝa. Ĉiuj nove sendependaj ŝtatoj kompreneble elektis kiel sian ĉefan taskon la atingon de ekonomia memstareco. Tio devigas ilin disvolvi kiel eble plej rapide sian propran industrion, konstrui fabrikojn, moderne ekipitajn havenojn, ŝoseojn kaj fervojojn, kaj solvi urbo-planajn problemojn. Ĉio ĉi bezonas instruitulojn — inĝenierojn, teknikistojn kaj tutan armeon da instruitaj laboristoj. Tia personaro ne estas kreebla, se la popolo restas analfabeta.


En tia mallonga artikolo ne eblis trakti ĉiujn problemojn, kiuj rilatas al afrikaj lingvoj. Tiaj problemoj estas tre multaj. Sed urĝe necesas fari la unuajn paŝojn per pretigo de normigitaj skribsistemoj por la plej gravaj lingvoj de la afrika kontinento.

(Represita, kun koncizigo, el "Kuriero de Unesko")

*Karavelo: speco de eŭropa velŝipo.

Patro klarigas al siaj infanoj la signifon de hieroglifaj reliefoj sur palaco en Dahomeo.





Ib Schleicher

ESPERANTO EKDE LA NASKIĜO

Neniam tiuj 3 knaboj kaj ilia patro uzis inter si la gepatran danan lingvon. Ankoraŭ nun ni uzas nur la lingvon Esperanto. Ke tiu sistemo funkciis dum 14 jaroj, kaj ke ni ne intencas ŝanĝi tiun enradikiĝintan kutimon, tiu fakto sufiĉe atestas pri la uzebleco de la lingvo. Ĉiu, kiu havas infanojn, amas ilin kaj volas komuniki kun ili, nepre scias, ke antaŭ multe da jaroj mi malsukcesus, se la lingvo ne prezentus sufiĉe da esprimeblecoj. Eĉ helpante Peter pri liaj matematikaj taskoj mi ne uzas la danan lingvon.

Mi ne scias, ĉu tia esperantlingva infaneduko iam estos ĝenerala afero, sed ne povas esti dubo pri tio, ke ankoraŭ multaj estas en situacio favora por fari same. Cetere la spertoj montras, ke la praktikado de la infanoj plene silentigas tiujn, kiuj dubas pri la viveco de la lingvo.

Kiu unuafoje aŭdas pri tia eksperimento nature demandas ekz. jene: "Ĉu tio ne malhelpas al la infanoj ellerni la danan lingvon, ĉu ili povas atingi perfektan esprimkapablon en la propra lingvo, okupante sin samtempe pri du lingvoj?" Aliaj, eĉ homoj kun serioza intereso pri la Internacia Lingvo, demandas, ĉu tio ne estas granda troigo, esprimi de ia fanatikeco? Pri mia eventuala fanatikeco juĝu aliaj kaj ne mi mem, sed kun plena certeco mi povas diri, ke la ĝisnunaj spertoj neniel montras malavantaĝojn. Kontraŭe la infanoj ja frue en sia vivo ekkonscias pri multaj problemoj ligitaj al internaciismo, ĝuste ĉar estas nature reliefigi ilin en tiu kunligo. Krom tio ili kompreneble ricevas duan lingvon "kvazaŭ senpage", kaj tio sendube estas helpo ĉe lernado de aliaj lingvoj. Tiel ŝajnas ĉi tie.

Ĉe kontaktiĝo kun ministroj kaj parlamentanoj dum la subskriba kampanjo en Danlando mi uzis i.a. la lingvan kapablon de la tiam apenaŭ 7-jara Henriko por demonstri la taŭ-

gecon de la lingvo, kaj tion kaŭzis specialaj cirkonstancoj.


Iam mi promesis al Peter kaj Ole certan sumeton por legi libron en Esperanto kaj substreki la vortojn nekompreneblajn. Tion ili faris kaj per tio liveris tre interesan materialon por plia studado, sed kiam ili ricevis la monon, Henriko kverelis, ĉar li ricevis nenion. Li tuj postulis saman aranĝon, sed tio ne estis ebla, kompreneble, ĉar eĉ en dana lingvo li ja ne kapablis legi. Mi multe klarigis al li tion, sed li finis la diskuton dirante tre firme: "Do vi ja povas legi por mi!!" Kaj kompreneble li pravis. Mi mem ne kaptis tiun ideon.

Poste mi legis por li, frazon post frazo, la komencon de la fabelo "La Marvirineto". Laŭ mia voĉlegado en Esperanto li liveris perfektan danlingvan tradukon esprimantan per propraj vortoj, kaj feliĉe mi surbendigis la tutan provon, ne por speciala celo, sed nur ĉar tio estis interesa.

En la subskriba kampanjo tiu surbendigo montriĝis tre utila. Kiuj aŭdis ĝin esprimi grandan miron. La dana eksinstrumministro, K. Helveg Petersen, atente sekvis la danan tekston komparante ĝin kun la buŝa traduko de la knabo. Kiam la knabo hezite parolis, la eksministro spiris retene, kaj kiam Henriko flue kaj glate tradukis, lia spiro videble plifaciliĝis. Li ne dubis pri la taŭgeco de Esperanto kaj eĉ eldiris, ke li trovas ĝin bonsona kaj bela kiel la itala. Ĉe alia demonstracio nia kulturministro, Hans Sølvehøj, kun miro eldiris, ke nun li mem aŭdis, ke per tiu lingvo vere estas eble esprimi nuancojn. Tiuj du elstaraj personoj kaj ankaŭ aliaj, kiuj aŭdis la bendon, klare vidis, ke tia sistemo donas palpeblajn avantaĝojn.

(daŭrigo dekstre)

PRESKAŬ FINIĜIS LA SUBSKRIBO-KAMPANJO



Tuj sendu ricevitaĵajn subskribojn!

Kvankam en la landoj proksimaj al Rotterdam ankoraŭ restos, post apero de ĉi tiu revuo, iom da tempo por lastaj klopodoj en la kampanjo por la Propono al UN, el pli foraj landoj necesos jam tuj ekspedi al la C.O. ĉiujn ankoraŭ ne forsenditajn subskribojn. La limdato de 31 julio por la ricevo en Rotterdam ne estas ŝanĝebla. Kompreneble, por gravaj unuopaj subskriboj eblas aerpoŝta sendo el kiu ajn terparto ankoraŭ ĝis la lastaj tagoj de julio.

Statistiko je la 3-a de junio montris, ke la alvenado de subskriboj denove plirapidiĝis anticipe al la limdato. Ĝis tiu dato alvenis subskriboj de 789 549 individuoj kaj de 3565 organizaĵoj kun pli ol 62 milionoj da anoj.

Laŭ absoluta nombro de individuaj, Bulgarujo (174 109) jam superis Japanujon (161 318). Sekvas Jugoslavio kaj Hungarujo. Hungara Esperanto-Junularo tre aktiviĝis kaj en la lastaj du monatoj varbis pli ol 5 000 individuojn. Po pli ol mil kolektis Glauco Corrado (Italujo) kaj Georgo Csüllög (Hungarujo). La grupo en Vercelli, Italujo, kolektis plurajn centojn per stando sur la ĉefstrato de la urbo.

La nombro de organizaĵoj grave kreskis ĉefe per kelkaj centoj da hungaraj, kvankam malgrandaj. Subskribis ankaŭ la Federacio de

Familioj de Francujo, kiu kunligas 100 000 familiojn.

Pliaj ministroj apogas

Al la pli frue subskribintaj trafik-ministroj aŭstra, belga kaj germana aliĝis nun ankaŭ la itala, s-ro Oscar Luigi Scalfaro, kune kun la ministro pri administra reformo, Bertinelli virginio. Jam pli frue ni anoncis la subskribon de la hispana ministro pri turismo; lian ekzemplon sekvis jenaj eminentuloj el la turisma mondo: Georges Despland, prezidanto de la Svisa Nacia Oficejo de Turismo; Arthur Haulot, ĝenerala komisararo de la belga turismo; d-ro Werner Kämpfen, direktoro de la Svisa Nacia Oficejo de Turismo; J. A. Risseuw, direktoro de la nederlanda turisma instanco A.N.V.V.; la prezidanto kaj ĝenerala sekretario de UIOOT (vidu p. 122) kaj la ĝenerala help-sekretario de Internacia Alianco de Turismo (A.I.T.).

Subskribis ankaŭ d-ro W. Drees, iama ministro-prezidanto kaj nun ŝtata ministro nederlanda; Arnold Nordmeyer, iama ministro kaj nun estro de la labor-partio de Nov-Zelando; Ralph Harry, aŭstralia ambasadoro en Belgujo; la prezidanto de la Reĝa Art-akademio de Danlando; kaj 31 el la 80-parlamentanoj de Nov-Zelando.

Estus nature atendi, ke danaj elstaruloj opinias, ke estas iom stranga afero, ke dana patro neniam parolas kun siaj infanoj en la dana lingvo, sed ĉiam nur en Esperanto. Tamen, tiun flankon de la afero ili eĉ ne tuŝetis, kaj tio donas al mi kroman kaŭzon por aserti, ke en nia movado oni neniel bezonas heziti en tiu rilato. Oni povas kun plena trankvileco fari sian plejebelon por krei intereson pri tia aktiveco. La eblecoj, kiuj kuŝas tie, meritas la plej grandan atenton. Avantaĝoj atendas, ne nur por la movado, sed ankaŭ, kaj ne malpli, por la koncernaj infanoj kaj gepatroj.



Estas nun tiel, ke en nia aranĝo komencis partopreni ankaŭ du ĝemelaj fratinetoj de la tri knaboj. Ili naskiĝis ĵus antaŭ kristnasko kaj jam ricevis siajn unuajn lecionojn, kiuj ne estas ordinara instruado, sed simpla alparolo en Esperanto, kaj same kiel en la nacia lingvo ĝi komenciĝu preskaŭ tuj post la naskiĝo.

Por la knabinetoj la lingvaj cirkonstancoj estas pli favoraj, ol siatempe por la knaboj. Tiam en la komenco ni agis tiel, ke nur mi parolis en Esperanto kaj nur al ili, dum iom post iom ili aŭtomate komencis respondi samlingve. Ni konscias nun, ke kiam nur la patro tion faras, la influo de Esperanto estas malpli ol dekonon de tiu de la dana, kaj ĝi devus esti pli granda. Tial ni ŝanĝis la aranĝon. Por la patrino, kiu dum la tuta periodo aktive interesis sin pri la lingvo, ĉiutaga uzado de ĝi ne plu prezentas konsiderindan ĝenon, kaj sekve ni interkonsentis, ke ĉiam, kiam la patro estas hejme, la tuta familio aŭtomate uzu en ĉiuj rilatoj nur tiun lingvon. Tiu aranĝo, kiu por la knaboj estas ligita al la poŝmona sistemo, nun tute bone funkcias kaj sekvigas, ke niaj ĝemelaj knabinetoj iom post iom praktikos la Internacian Lingvon ne nur en rilato al sia patro, sed ankaŭ en rilato al siaj tri fratoj kaj en rilato al sia patrino, kio lasta ne estas malpli grava kaj efika.

esperanto
juli-aŭg. 1966



Kikunobu Matuba

LA PEREANTA LINGVO AINA

Pri la japana lingvo jam kontribuis en tiu ĉi serio prof. N. Kawasaki (1965, julio, p. 126). Sed ĝi ne estas la sola lingvo de Japanujo. Tiu ĉi artikolo de K. Matuba, instruisto pri lingvoj kaj matematiko, koncize prezentas alian, nun malfacile sin tenantan. La aŭtoro estas membro de la Lingva Komisiono de Japana Esperanto-Instituto. Li kontribuis al la traduko de "Rakontoj de Oogai".

artikolserio:

LA ETNAJ LINGVOJ EN KOMPARO KUN LA INTERNACIA

7: la aina

Abundaj loknomoj dise troveblaj en la nord-orienta parto de Japanujo kaj glosaro de japanaj tradiciaj ĉasistoj aludas, ke la ainoj okupis en la antikva tempo tiun vastan areon en la nordo de ĉ. 37° de la norda latitudo.

La bedaŭrata doktoro Maŝiho Ĉiri, mem aino, iama profesoro pri lingvistiko kaj ainaj lingvo kaj literaturo en Universitato Hokkaidō, skribis en 1955: la plejparto de la ainoj nun loĝantaj en Hokkaidō, sangmiksiĝis kun japanoj por tiel maldensigi sian etnan proprecon, rapide asimiliĝis sub la asimila politiko de la japana


registaro efektivigita ekde la Meizi-Epoko (1867-1912), kaj perdis sian propran kulturon, ĝis ili nun havas vivon neniel distingeblan de tiu de japanoj. La gento aina jam pereis, kaj la ainoj estas, se diri strikte, ne plu pursangaj sed nur aindevenaj japanoj!...

La aina lingvo nun dividiĝas en du dialektoj: sagalena kaj hokaida. La sagalenainoj vivis en grupetoj fiŝistan vivon sur la bordoj orienta kaj okcidenta de Sagaleno, sed, ĉ. la Mondmilito II, preskaŭ la tuto el ili transloĝiĝis al Hokkaidō. Sekve nun loĝas sur tiu insulego la ainoj de ambaŭ dialektoj, kies nombro kompreneble ne estas precize klara, sed verŝajne 15 000 estas la hokaidaj kaj nur 1300 la sagalenaj.

La du dialektojn nur malmulte diferencigas ĉefe malsama prononcado. Kompreneble ekzistas ankaŭ kelkaj vortoj ne komunaj por ambaŭ dialektoj, sed ties nombro estas malgranda, kaj regas en ambaŭ gramatiko apenaŭ diferenca.

La ainaj vokaloj estas 5: a, e, i, o kaj u. La longeco de la vokaloj ludas nenian semantikan rolon. Ĉefaj konsonantoj: k(g), t(d), p(b), s(ŝ), h, ŭ, j, ĉ(ĝ), m, n kaj r. La sonoj k, t, p kaj g, d, b estas oftege intermiksataj, kaj oni povas tute senĝene prononci la duajn por la unuaj. Ankaŭ s kaj ŝ estas sendistinge uzataj tiel, ke oni povas ekskluzive prononci s, kiam la ĝusta valoro estas ŝ, escepte la okazon, kiam ĝi staras rekte antaŭ la vokalo i. La akcento estas muzika. La silaboj estas jen malfermitaj, jen fermitaj.

La substantivo montras nek genron nek nombron; *utar* (kolego) estas sufiksata por indiki, ke temas ne pri pluralo, sed pri multeco. Kiam aparteno aŭ posedanto de io estas klara, la substantivo prenas personan formon, nome la posedo estas indikata per personaj prefiksoj: 1. persono singularo: *ku-*; 1. p. plur.: *a-* (inkluziva), *ĉi-* (ekskluziva); 2. p. sing.: *e-*; 2. p. plur.: *eĉi-*; 3. p. sing. kaj plur.: —. Ekz.: *ak* = plijuna frato (abstrakta formo aŭ radiko), *kuaki* = mia frato, *eaki* = cia frato, *aki* = lia frato ktp.



Komparu tamen: *Ĉita unarpe ek* = Ĉita, la onklino, venas; *Ĉita unarpehe ek* = Ĉita, ties-onklino, venas = Onklino de Ĉita venas.

Kazoj estas indikataj aŭ per nenio: *tan-pe huĉi kukore an* (ĉi-tio(n) (al-)avino mi-donas) aŭ per postpozicio: *makiri ani tuje* (tranĉilo -per li-tranĉis = li tranĉis per tranĉilo).

Jen la nombroj: 1 *ŝine*, 2 *tu*, 3 *re*, 4 *ine*, 5 *aŝkne*, 6 *iwan*, 7 *arwan*, 8 *tupesan*, 9 *ŝinepesan*, 10 *wan*; 11 *ŝine ikaŝma wan*, 16 *iwan ikaŝma wan*; 20 *hotne*. La nombroj pli grandaj ol 20 sin bazas sur 20. Do: 40 *tu hotne*, 60 *re hotne*, 100 *aŝkne hotne*, 50 *wan e tu hotne*, 70 *wan e ine hotne*, 90 *wan e aŝkne hotne*.

La verbo konjugaciigas ne sole laŭ la subjekto, sed, ĉe la transitiva, ankaŭ laŭ la objekto, kiu apartenas aŭ rilatas al la subjekto. Nome la aina verbo havas konjugaciojn subjektan kaj objektan.

De kiu lingva familio ?

Neniu ankoraŭ sukcesis trovi, al kiu lingvo-familio apartenas la aina. Laŭ la vortordo ĝi similas al la japana: la subjekto antaŭstaras la predikaton, la objekto la verbon, kaj la kvalifikanto la kvalifikaton; helpvortoj estas postpoziciaj kaj adjektivoj konjugaciigas kiel verboj, respektive en ambaŭ lingvoj. Tamen regas ter-al-ĉiela diferenco inter la verbokonjugacioj de la du lingvoj. La japana verbo konjugaciigas precize kiel en Esperanto, do simpleco mem, dum la aina aplikas en konjugacio personindikajn prefiksojn duoble aŭ trioble tiel por la subjekto, kiel por la objekto(j). Foje eĉ adverboj kaj komplemento kunvenas en la korpo de unu verbo por formi gigantan vortomonstron, kiu aspektas kvazaŭ tuta propozicio malfacile prononcebla sen interna spirpaŭzo! Ekz.: *usa-orupse a-e-jai-ko-tuima-siram-sui-pa* = diversa onidiro mi/pri(tio)/mem -per malproksime(n)/al-si/koro/lul-/adis = Pri diversaj onidiroj mi ĝis malproksima paseo mem returne okupiĝas (primeditas).

Kun tia polisinteza karaktero de la aina, per kiu, ĉefe, d-ro Kyōsuke Kindaiti, emerita profesoro de la Universitato de Tokio kaj glora mondfama ainologo, kiu en fakto kompletigis la ainan lingvistikon, konvinke certigas la absolutan fremdecon de la aina al la japana, ni, nefakuloj, staras nur gapaj antaŭ d-ro S. Hattori, lingvistika prof. de la sama universitato, kiu aplikis la teorion de glotkronologio de Swadesh kaj alvenis al la konkludo, ke la aina povus esti dispartiĝinta de la japana antaŭ 7000 aŭ 8000 jaroj, se ili estus apartenintaj al komuna pralingvo.

La bildoj montras aspektojn de la malnova aina vivo antaŭ la asimiliĝo al la japana kulturo. Supre: infanoj kun vartistino. Sube: simpla teksilo.



La 15-an de majo nunjara pasis 50 jaroj de la morto de juda verkisto Ŝalom Aleĥem, famiginta tra la mondo pro sia ampleksa jidlingva verkaro, plena de optimismo kaj de humuro. Lia propra vivo tamen ne estis facila.

Ŝ. A. naskiĝis en 1859 en Ukraino kaj mortis en 1916 en Novjorko, ne sukcesinte fini sian aŭtobiografion, pri kiu li laboris.

Liaj verkoj aperis en multaj tradukoj, en Esperanto malgrandan elekton (Hebreaj rakontoj, Hirt, Leipzig 1923) preparis Iĥak Muĉnik. La fama ĉina verkisto Lu Jan tradukis la tekston de Muĉnik en ĉinan lingvon kaj eldonigis ĝin en 1929 en Ŝanhajo.

En 1966 oni solene malfermis en Tel Aviv la Domon de Ŝalom Aleĥem.



Ĉu vi aŭdas, Hinda, kion mi al vi diras? Vere valoras vendi de sia korpo eĉ lastan ĉemizon, se oni per tio povus estiĝi riĉa!

Kion celas viaj vortoj?

Mi estis en domo de bienulo, kaj oni alportis sur la tablon ovan omleton. Kion mi parolu kaj kion mi diru? Reĝa manĝo!

Miraklon vi vidis! El kio oni ĝin tie preparis? Ĉu el birda lakto?

Kion mi parolu kaj kion mi diru? Ĝuste paradiza!

Ĉu vi gustumis?

Dio min gardu! Ĉu mi fianĉiĝis al la riĉuloj kun iliaj omletoj?

Kiamaniere vi do scias?

Ĉu mi ne havas okulojn kaj ĉu mi ne vidas? Mi ĝuis de malproksime. Mola pro graso, ĝi degelis en la buŝo kiel butero.

Kompreneble, riĉuloj! Kio al ili mankas?

Mia kapdoloro! Ĉu vi scias, Hinda? Mi dezirus ... hm ... hm ... ke vi fritu ovan omleton ankaŭ por mi foje ...

Ĉu vere? Ĉu vin kaptis ia manĝofuriozo? Kaj kial ne? Almenaŭ unufoje en mia vivo! Kaj ĉu vi ne freneziĝis?

Hm ... hm ... Mi nur eksopiris en mia koro. Mi petas vin, Hinda, bonvolu fari por mi ovan omleton! Rigardu, mi vin petas.

Kio venis subite en vian menson? Ĉu vi scias, el kio oni faras ovan omleton?

De kie mi tion sciu?

Se estas tiel, kial vi parolas malsaĝaĵojn? Antaŭ ĉio kutimas la riĉuloj meti en la omleton nemezureblan kvanton da butero!

Pri tio mi ne insistas, ĝi estu sen butero. Gravus nur, ke vi faru ovan omleton!

Bele vi diris! Kaj kio estos pri lakto?

Pri ĝi mi ne insistas. La omleto estu sen lakto. Nur faru la omleton!

Ĝis nun mi konsentas. Sed ovo! Sen ovo oni ja ne faras ovan omleton!

Ovoj! Kie vi trovis skribite: o v o j en multnombro? Oni kirlas unu ovon kaj oni faras ovan omleton.

Se estus nur laŭ viaj vortoj! Sed kie mi prenu? Estis unu ovo, kaj en pasinta sabato mi uzis el ĝi duonon de ovoflavo, kiam mi farĉis fiŝojn kaj la alian duonon por ŝmiro de festotaga blanka pano.

Mi petas, Hinda, ne provu fuĝi de mi! Se vi volas, vi trovos jam manieron, kiel prepari por mi omleton.

Sed el kio? Ĉu el ova ŝelo? Mi ja havas nur duonon de ovo!

Vi estas ja dommastrino!

Eĉ se mi estas dommastrino, kion mi kapablas? Ĉu prepari el iometo da faruno?

Prenu farunon, nur por ke vi faru tiun omleton!

Vi estas tamen saĝulo! Kaj kie mi prenu tiun farunon?

Ĉu ankaŭ faruno estas granda afero?

Ĝi estas granda afero! Se ne estas faruno,

NEKROLOGOJ

F T. LUNDQUIST (1882-1965)

En decembro 1965 forpasis 83-jara eksŝipestro F. T. Lundquist, vicdelegito de UEA. Li lernis Esperanton post sia emeritiĝo kaj debutis 80-jara kiel Esperanta verkisto per la libro "Ŝipestro rakontas".

SUN GUOĜANG

La 14-an de decembro 1965 mortis en Vuhan 81-jara pioniro de la ĉina Esperanto-movado, s-ro Sun guoĝang, kunfondinto de Ĥina Esperantista Asocio (ĤEA).

ANTOINETTE RACINE

La 10-an de majo mortis en Cannes (Francujo) 87-jara Antoinette Racine, konata pro partopreno en multaj internaciaj kongresoj.

ADELAIDE GIROLDI

La 23-an de majo forpasis en Torino, Italujo, f-ino Adelaide Girolodi, FD de UEA kaj aktivulino de la itala movado.

PLORI, PLORI, PLORI

Endre Ady

Atendi en la nokto dekdu-bata
Je ĉerko, lante alportata.

Demandon pri l' mortint' ne meti,
Al sekvantaro sonoreti.

Sub tend' arĝenta, nigra tolo
Balanci krucon sen konsolo.

En nigro, peza arĝentumo
Sufoke spiri pro l' torĉfumo.

Kun krakaj ombroj batalante
Obtuzan psalmon ĝemi kante.

Aŭskulti je l' orgen' muĝtrema,
Tombsonorilo profundĝema.

Paŝi tra tombaj kavoj glutaj
Kun nigra pastro, knaboj mutaj.

Rigardi kaŝe, ŝtele, time
Mortinton fremdan, trem-anime.


Frosti sub Luno superŝtiĉa,
Spiregi en incenso riĉa.

Brust-bati pri l' Paseo brue
Sub sorĉ' fatala, surgenu.

Konfesi ĉion. Kaj kulp-cite,
Sur ĉerkon fali kor-rompite.

Testamenton teruran aŭtori
Kaj plori, plori, plori, plori.

Trad.: Kálmán Kalocsay



Pri Endre Ady (1877-1919) skribis Tárkony en 1933: "Lia liriko estas la plej grava kaj grandioza fenomeno de la hungara literaturo XX-jarcenta". La apuda traduko estas tute nova. La ilustraĵo estas de Ferenc Lajos (vidu feb., p. 28).

(daŭrigo de maldekstre)

ne estas omleto! Eble farunon el poligono?

Prenu poligonan farunon, nur por havi omleton!

Ve al tiu ĉi gusto! Ĉu eble kun cepo?

Prenu cepon, sed faru nur tiun omleton!

Mi preskaŭ forgesis! Mi ne havas cepon, sed estas ĉi tie ero de ajlo.

Prenu eron de ajlo, sed faru tiun omleton!

Bela omleto! Per kio mi ŝmiru la paton?

Ŝmiru per kio ajn, nur por ke estu tiu omleto!

Al ova omleto sopiras lia animo! Atakis lin la ideo, ke mi preparu ĝin. Li vidis ion en domo de bienulo kaj obsedis lin deziro. Se la bienulo fortranĉos sian nazon, ĉu devas nun fortranĉi sian nazon ankaŭ li? Kiel simio ... Bonvolu! Jen vi havos vian ovan omleton ankoraŭ en tiu ĉi tago! ... Iru lavi viajn manojn! La omleto estas jam preta!

Jam preta estas la omleto? Vi estas do virino-bravulino, Hinda! Mi ĵuris al mi: La riĉuloj fanfaronas en sia interno, ke nur al ili apartenas la tuta mondo. Tamen ankaŭ malriĉulo, se li tion deziras, povas plezurigi sian animon per omleto. Ha, ĉarma manĝo, ĝuo por okuloj! Aromo de ajlo kiel aromo de paradizo - ĝi revivigas animon! Estu benita, Hinda kaj benita estu via gusto! Se mi estus riĉa, ĉiutage mi manĝus ovajn omletojn ... Tamen ... kio estas tio? ... Hm ... hm ... Ĉu vi aŭdas, Hinda, kion mi al vi diras? Via ova omleto havas guston iel ... jes, guston iel strangan! Ĝi estas acida, mankas en ĝi salo kaj ĝi gluiĝas al la palato ... Hm ... hm ... pardonu min do ... ne tion mi imagis! ... Hm ... hm ... Dio ne enkalkulu al mi kiel pekon, kion diris mia buŝo! Abomena gusto, fi! ... Diablo komprenu ilin, la riĉulojn, kaj la bon-gustaĵojn, kiujn ili elpensis.

El jida tradukis Ota Ginz

esperanto
juli-aŭg. 1966

En la aprila numero de tiu ĉi revuo (p. 74) s-ro Pauli Riihivaara publikigis leteron, en kiu li - prezentinte kelkajn specimenojn de erara (malzorga) prononcado - admonis la esperantistojn "nun per nova energio komenci efikan kampanjon por unueco de prononcado en la tuta mondo. Ĉiu litero devas esti prononcata kiel eble plej klare, distinge kaj samece ĉie".

Estas vere, ke tre ofte oni aŭdas ekzemplojn de malĝusta prononcado, kaj - kvankam la eraroj efektive ne tre ofte grave malfaciligas la komprenon - sendube ĉiuj konsentas pri tio, ke ĝenerala strebado al korekta prononcado estas dezirinda kaj necesa.

La kaŭzo de misprononcoj estas ne nur nescio aŭ malzorgemo de la parolanto. Ĝi povas ankaŭ, bedaŭrinde, esti nesufiĉa aŭ malkorekta instruo de lernolibroj, kiel s-ro Riihivaara montris per unu ekzemplo, kiu ĉi-sube estos suplementita.

Laŭ la 9-a regulo de la Fundamenta Gramatiko "ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita". Malgraŭ tio oni legas en la "Internacia Gramatiko" de L. Kitzler (1934), p. 12, "ke en la praktiko oni kvalite egaligas du najbarajn konsonantojn, kiuj sen parolpaŭzo ne povas esti elparolataj unu post la alia; oni egaligas cetere la unuan konsonanton al la dua, skribante ekzemple: *ekzameni*, *dekduo*, *vivkondiĉo*, *absolute* ktp., sed elparolante (ne traduku): *egzameni*, *degduo*, *vifkondiĉo*, *apsolute* ktp."

Simile en "La tuta Esperanto" de H. Seppik (1938), p. 13, oni ricevas la instruon, ke "en la vortoj: *absolute*, *absurda*, *obtuza*, ekzemplo, ekzisti k.a. 'bs' kaj 'bt' devus esti elparolataj kun la sama 'b' kiel en sabato kaj abdiki, 'kz' kun la sama 'k' kiel en akra. Sed tio estas malfacila kaj kontraŭnatura. Tial ni diras kiel en la aliaj lingvoj "apsolute, apsorda, optuza, ekzemplo, ekzisti". Sed en kunmetitaj vortoj kaj post prefikso 'ek' ili kompreneble konservas sian originan prononcon: *korbtenilo*, *trabsigno*, *ekzumi*." (Oni rimarkas, ke la du aŭtoroj havas malsamajn opiniojn pri la kunmetitaj vortoj.)

K. Kalocsay kaj G. Waringhien apogas la saman ĉefan vidpunkton. En "Plena Gramatiko de Esperanto", 3-a eld., 1-a Kajero (1958), p. 39-40, ili asertas, ke "ĉe senpera sinsekvo de konsonantoj voĉa kaj senvoĉa, neevitebla estas la sonkonformiĝo de unu el ili. Tiel oni prononcas proksimume: *apsolute* (absolute), *ogdek* (okdek), *egzisti* (ekzisti), *lonktempe* (longtempe), *glafsonoro* (glavsonoro) ktp. Teorie oni povas tion kondamni, sed la postuloj de la parolorganoj estas pli potencaj ol la teorio."

Ĉu pravas la aŭtoroj de la tri libroj? Ĉu Zamenhof donis al Esperanto ortografion ne ĉiam konformigeblan al la citita regulo de la Fundamento?

Parolante ni devas alterne funkciigi kaj silentigi la voĉkordojn por prononci vokalojn kaj voĉajn konsonantojn aŭ senvoĉajn konsonantojn respektive. La funkciado de la voĉkordoj estas fiziologie tute sendependa de la funkciado de la artikigaj organoj de la buŝo, kaj oni povas ĉiam inter du sonoj ekvibrigi aŭ senvibrigi la voĉkordojn. Tial la aserto, ke pro "postuloj de la parolorganoj" oni ne povas prononci sonkombinojn kiel 'bs' kaj 'kz', ne estas ĝusta.

Alia afero estas, ke la prononcaj manieroj de la nacia lingvo, al kiuj kutimiĝis la parolorganoj, estas "katenoj", kiujn la lingvolernanto devas rompi. Tiujn sonojn kaj sonkombinojn en la lernata fremda lingvo, kiuj kontraŭas al la propra lingvo de la lernanto, li kelkfoje trovas tre malfacilaj, kaj ĝuste pro la ekzercado necesa por kutimiĝi al la fremdaj prononcm manieroj li emas konsideri ilin kontraŭnaturaj - precipe se la lernata lingvo estas la "artefarita" Esperanto.

Sed malfacileco ne egalas al neebleco. Verdire, kelkfoje la parolorganoj postulas multan ekzercadon por povi fari limon inter voĉeco kaj senvoĉeco en la ĝustaj momentoj dum parolado en Esperanto, sed tio ne signifas, ke eraroj estas neeviteblaj. Efektive, la pritraktata sonkonformiĝo (asimiliĝo) akceptita de la cititaj tri verkoj signifas malobeon al la 9-a regulo de la Fundamenta Gramatiko.

Rilate al la "neevitebla sonkonformiĝo" oni cetere povas referenci al "An Outline of English Phonetics" de Daniel Jones, kiu informas (sur p. 228 en la 9-a eld., 1964) pri certaj konsonantkombinoj, en kiuj i.a. francoj ne praktiku sonkonformigon laŭ voĉeco, kiel pro siaj nacilingvaj kutimoj ili ordinare emas. Prof. Jones ekz-e atentigas, ke en la anglaj vortoj 'anecdote' kaj 'absolute' oni prononcu '-kd-' kaj '-bs-', ne '-gd-' kaj '-ps-', respektive.

Sekve, la tri supre cititaj tekstoj bezonas almenaŭ modifon.

H. V. Rasmussen

Lyngby, Danlando, 22 majo 66

ANKORAŬ PRI PRONONCADO

S-ro Riihivaara, Finnlando, prave skribis en nia revuo n-ro 725, p. 74, ke ni devas gardi la unuecon de prononcado de nia lingvo, ke ĉiu litero devas esti prononcata kiel eble plej klare, distinge kaj samece ĉie.

Mi, japano, tute same opinias.

Iu sonbendo aŭdigis la vorton 'intanacia' aŭ 'intanasia', por la 'internacia'. Mi ne povis pravigi la miksiĝon de 'er' kun 'a', al miaj kursanoj-geknaboj.

Japanoj tute ofte emas prononci 'Mi esutasu kunabo' por 'Mi estas knabo', ĉar laŭ nia lingva konstruo, ĉiu konsonanto, escepte n, neniam memstaras, sed kunestas kune kun iu vokalo.

En la 50-a U.K. oni multon 'infomis' kaj 'rapotis' kaj 'rimakigis'. Mi ankore deziris ke ili 'informu' kaj 'raportu' kaj 'rimarkigu' al si siajn nekklarajn prononcojn.

Mi ankaŭ, ne 'anko', deziras, kune kun s-ro Riihivaara, ke oni atente prononcu, klare, distinge ĉiun literon, kiel ĝi estas skribita.

Okumura-Rinzo
Osaka, Japanujo

econ de la objekto, (b) propran posedaĵon, (c) netransitivajn agojn aŭ pasivan sencon (la t.n. akuzativan genitivon).

Ekzemple: 'taku papa', mia patro; 'tona tamaiti', lia infano; 'oku kakahu', miaj vestaĵoj (rimarku la ellason de la komenc-litero de la poseda adjektivo por indiki pluralon); 'aku kakahu' signifas vestaĵojn, kiujn mi portas, sed kiuj ne estas vere miaj; 'te matenga o Henare', la mortigo de Henriko; 'te matenga a Henare', la mortigo fare de Henriko. Oni diras 'taku mokopuna', mia nep(in)o, sed 'oku uri', miaj posteuloj, ĉar ili estos preter mia rego. Sed tiaj ĝeneralaj ideoj foje inter si konflik- tas, ekz. la plimulto de moveblaj posedaĵoj havas la a-formon, sed trinkaĵoj, kuraciloj, kanotoj kaj vestaĵoj kutime la o-formon.

F. A. Tocker
Whangarei, Nov-Zelando, 25 apr 66

LINGVOJ DE OCEANIO

Pri la interesa kaj informa artikolo "Lingvoj de Oceanio" (feb. 1966) mi volas komenti por forpreni eblajn erarajn impresojn.

La kutima esprimo por 'mia edzo' estas 'taku tane' kaj por 'mia edzino' - 'taku wahine'. La seksoj estis kaj estas egalaj pri superrego. Sed alia esprimo estas 'toku hoa', mia edz(in)o, ankaŭ egala kaj montranta kamaradecon - kamaradoj helpas unu la alian. 'Tahu', edz(in)o estas antikve 'te tahu o te ate': la kordo de mia hepato, t.e. karul(in)o de mia koro.

La reguloj pri o-vortoj kaj a-vortoj ne estas tre simplaj. Tre ĝenerale, a-formo montras (a) superecon de la posedanto, (b) pli-malpli komunan posedaĵon, (c) transitivajn agojn aŭ aktivan sencon. La o-formo montras (a) super-

UTILOJ DE KOMPOSTO-STRIOJ

En la maja "Esperanto" d-ro Schlüter priskribis la uzon de paper-strioj en kompostado kaj la konservadon de tiuj por eviti retajpadon okaze de reeldono. Tiuj paper-strioj povas esti uzataj por malnecesigi la en-tajpadon ankaŭ ĉe kalkuliloj. Kalkulmaŝinoj povas fari lingvistikajn analizojn, kiuj alie estus tro granda laboro (eble ankaŭ aŭtomatajn tradukojn). Do, se iu laboras pri vortaro aŭ alia grava verko, li eltrovu, ĉu la presisto uzas paperstriojn (aŭ aliajn maŝin-legeblaĵojn), kaj, se jes, konservigu tiujn. Tio helpas enkonduki la potencon de kalkuliloj en nian aferon.

M. E. Falla
Southampton, Britujo, 13 majo 66

RESPONDOJ AL KONTRAŬ-ESPERANTAJ PAROLOJ

notoj por informado

2. "La vortoj de Esperanto havas nek sinonimojn nek dependajn ideojn. Tial ĝi ne taŭgas por literatura kreado."

Aŭdinte, ke la vortaro de Esperanto estas multe pli konciza, ol tiuj de la etnaj lingvoj, kaj sciante, ke nur malmultaj lernas la lingvon denaske, oni ofte konkludas, ke mankas al Esperanto du gravaj riĉaĵoj, kiujn en diversaj landoj oni rigardas kiel nepre necesaj por bel-literatura verkado: la ebleco elekti siajn vortojn el vasta provizo, kaj la personaj memoroj kaj subkonsciaj dependaj ideoj, kiuj en ĉies vivo ligiĝas al la vortoj, kiujn li uzas.

Ĉu mankas sinonimoj?

La unua eraro en tia argumento estas en tio, ke oni provas kompari sur sama bazo (numero de vortoj) lingvojn de malsama tipo. Se temas pri lingvo kiel la angla, la numero de vortoj estas proksimume difinebla; kiam temas pri Esperanto, aliflanke, kiu havas tute alian strukturon, nur la numero de radikoj, sed ne tiu de vortoj estas proksimume difinebla. En la

angla la verkisto uzas jam fiksitajn vortojn, en Esperanto li mem konstruas ilin, parte impro- vize; en ambaŭ lingvoj li havas grandan kaj liberan elekton. La dua eraro estas la supozo, ke en ĉiuj literaturoj la samaj lingvaj kvalitoj estas gravaj. Tio ne estas vera. Ĉiu lingvo havas proprajn riĉaĵojn. Kiel la angla verkisto ĝojas pro abundo de sinonimoj, tiel poeto en Esperanto ĝojas pro la riĉaj rimeblecoj kaj granda fleksebleco, kiuj mankas en la angla.

Ĉu mankas dependaj ideoj?

Car Esperanton la plimulto ne lernas denaske kaj ne uzas kiel ĉefan lingvon, kompreneble ĝiaj vortoj por ili ne portas tiom da kromideoj kaj afekciaj sencoj, kiel por tiu malplimulto, kiu uzas ĝin kiel familian lingvon. Kontraŭ tio staras la fakto, ke alproprigi al si Esperanton estas pluroble aŭ multoble pli facile, ol ellerni iun etnan lingvon. Tial la numero de parolan- toj, kiuj sentas Esperanton sufiĉe intima al si por literatura verkado, estas multe pli granda, ol kutime supozas tiuj, kiuj mem neniam lernis la lingvon.

V.S.

esperanto
juli-aŭg. 1966

* *Mendu ĉe UEA*

Versoj elektitaj, de Sergej Jesenin. El la rusa tr. diversaj. Eld. Komisiono pri internaciaj ligoj de sovetaj esperantistoj, Moskvo, 1965. 64 p. 21 x 14 cm., il., ofsetita. 1,20 gld.*

Mia impresado dum legado de la versoj estis, kvazaŭ mi subite forlasus bruon urban straton kaj troviĝus en idilia pejzaĝo, plena de betuloj, padusoj, viburnoj, kaj kampoj kun blujaj cejanoj kaj ruĝa papavo, ĉio apartigita for de la monda tumulto per alta muro. Tia estas la mondo de la poeto, lando arde amata kaj neforpenesebla de lia vivo. La poemoj estas ordigitaj laŭ datoj de ekesto, jar' post jaro, ek de 1910, kio kompreneble streĉas la scivolon de la leganto, kiamaniere la ege senteman animon de la poeto influis la eksplodo de la revolucio. — Sed jen venas surprizo. Aperas la jaroj 1917, '18, '19, lia amata patrujo brulas per flamoj de la civila milito, oni batalas kontraŭ la intervenuloj, blank-gvardianoj, kaj unu kontraŭ la alia, sed la poeto sidas post sia muro kaj daŭrigas sian kanton, iĝintan nur iom pli melankolia.

1918: Enamiĝis mi ĉarman vesperon,
Dolĉe flavas la val' en senfin'.
Vent' — junulo kun gaja sincero
Levis jupon al arbo-junin'.

1920: Jam aŭtunon disŝutas vent',

Pri aŭtuno folioj flustras.

Estas notinde, ke en la sama tempo lia samaĝulo Majakovskij, starante meze de la incendio, kantas siajn 150 000 000.

Nur kvar jarojn pli poste (1924) oni trovas aludon pri la mondo post la muro:

Plej arda kuniranto

Pli kaj pli

Mi iĝas en Soveta lando.

La lastaj 16 poemoj el la jaro 1925 montras esencan maturiĝon de la aŭtoro, kvankam eĉ tie la granda socia eksperimento nur apenaŭ rimarkiĝas post la amataj betuloj kaj viburnoj. Bedaŭrinde tie finiĝas ne nur lia verko, sed ankaŭ lia vivo. Same kiel Majakovskij, Jesenin mortis juna.

La tradukintoj sukcesis disvolvi antaŭ la leganto veran esencon de la verkaro de Sergej Jesenin, kaj same ili zorgis pri fidela speguligo de lia stilo. Se oni tie kaj ĉi tie trovas anstataŭ rimo asonancon, oni same ofte trovas tion en la originalo; sed same fidele speguliĝas en la traduko la perfekta fluo kaj ŝajna facileco de Jesenina poezio.

Eduard Felix (Prago)

Sekreta informilo. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1965. 32 p. 21 × 18 cm. Kolora infanlibreto.*

Pri infanrezistado kontraŭ la aŭtoritatuloj en Ŝanhajo dum la milito. Alloga al ĉiuagaj legantoj pro la ĉarmaj bildoj, la freŝa stilo kaj la grandeco kaj klareco de la litertipo.

R. H. M. Markarian (Britujo)

RESUMOJ KAJ RICEVITAJ ELDONAĴOJ

Respondaj leteroj de la Centra Komitato de la Japana Komunista Partio al la C.K. de la K.P. de Sovetunio. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1965. 164 p. 18 × 13 cm.*

Resumo: En kvin leteroj JKP kulpigas KPSU pro "malpravaj atakoj kaj intervenoj" kaj rebatas riproĉojn pri sektismo kaj splitismo, i.a. oponante la moskvan traktaton pri parta malpermeso de nukleaj eksperimentoj kaj la koncepton de KPSU pri paca kunekzistado. JKP ankaŭ kondamnas la esprimon de kondolencoj okaze de la morto de Kennedy.

Refuto al la t.n. "unuigita agado" de la novaj gvidantoj de KPSU. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1966. 48 p. 15 × 9 cm.*

Resumo: Ĉar "marksism-leninismo kaj Ĥruŝĉov-reviziismo ekskluzivas sin kiel akvo kaj fajro", ne eblas "unuigita agado", kiu estas "rimedo por irigi skismon". Sed "lukto kontraŭ Ĥruŝĉov-reviziismo estas proletinternaciisma devo".

Nuntempa Vjetnamio. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1965. 180 p. 19 × 13 cm. Ĝenerala informlibro kun kolorilustro, mapo k.s.*

Geologio (Éléments de géologie en six langues). Eld. SEDES, Parizo, 1965. 191 p. 24 × 16 cm., il. Paralelaj tekstoj angla, Esperanta, franca, germana, hispana, rusa.*

Resumoj kaj klarigoj de komunikoj 280-295. Eld. Instituto por Biologia kaj Kemia Esploro de Agrikulturaj Plantoj, Bornsesteeg 65, Wageningen, Nederlando. 37 p. 21 × 17 cm., multobl. Senpage sendata al samfakanoj.

Klosterneuburg. Eld. Fremdenverkehrsverein, Klosterneuburg, Aŭstrujo. Senpaga turisma faldfolio kun Esperanta aldono.

Samouczek języka esperanto. (Memlernilo de E.), de Andrzej Pettyn. Eld. PEA, Varsovio, 1964. Dua parto, 140 p. 19 × 14 cm., multobl.*

Esperanto-konversacioj, de Andrzej Pettyn. Eld. PEA, Varsovio, 1966. Partoj Dua kaj Tria, 127 kaj 116 p., resp., 21 × 14 cm., multobl. Por internacia uzo.*

La Esperanta konjugacio (vidu majo, p. 99) estas mendebla jam ĉe la eldonejo: Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Ned. Prezo: 13,50 gld. plus afranko 10%. La Unua Parto jam aperis, la Dua aperos en la aŭtuno.

Esperanto ŝgrenelim, de Jonathan Pool. Eld. Habora Kitabevi, Istanbul, 1966. 81 p. 29 × 22 cm., multobl. Lernolibro por turkoj.*

Muzilo-Kajero no. 4, de H. Paruzel. Eld. Muzilo, Nederlando, 1966. 76 p. 29 × 21 cm. (Pri Muzilo vidu okt. 1964, p. 171). 5,- gld.*

LAŬLANDE

Argentino

● Argentina Esperantista Junulara Organizo starigis novan servon, per kiu ĝi peros kontaktojn inter gejunuloj dezirantaj senpage gastigi en familioj eksterlande kaj familioj dezirantaj tiajn gejunulojn gastigi. Detale informas: Ruben Feldman Gonzalez, Bv. Oroño 866, Dto. "A", Rosario.

Aŭstralio

● La landa asocio decidis fondi Esperanto-muzeon omaĝe al la mortinta pioniro W. J. Drummond. Ĝi portos lian nomon.

Brazilo

● En junio okazis 5-taga "Unua Brazila Kongreso de Studantoj de Esperanto" en Uberlândia. Organizis la lernejo Colégio Anchieta, kie de 1965 Esperanto estas deviga studobjekto. La kongreso diskutis aron da temoj ligitaj kun instruado de Esperanto.

Britujo

● La 50-a Jubilea Kongreso en Norwich allogis grandan anaron. Prelegis la prezidanto de UEA, prof. Lapenna, d-ro R. H. Osborne, s-ro R. H. M. Markarian k.a., kaj deklamis N. Rytjkov.

Hungarujo

● Duonhoran elsendon la Hungara Televido dediĉis la 12-an de majo al la Fervojista Esperanto-Klubo en Budapeŝto, kun intervjuoj kun gravuloj kaj eksterlandaj gastoj.

Jugoslavio

● Jam la duan fojon en lastaj jaroj la prezidanto de la respubliko distingis nombron da personoj per ŝtataj ordenoj pro ilia laboro por Esperanto. Ĉi-jare ricevis 8 personoj el Kroaĵo.

Nederlando

● D-ro Willem Drees, iama ministro-prezidanto kaj nun ŝtata ministro, ĵus atingis sian 80-an jaron en bona sanstato. Al li, Honora Patrono de UEA, ni kore gratulas kaj bondeziras.

Rumanujo

● Malgraŭ malfavora sinteno al Esperanto de aŭtoritatoj rumanaj aperis lastatempe pluraj artikoloj en rumanaj gazetoj: pri la 50-a UK, pri Dante en Esperanto, pri la filmo "Inkubo".

Svedujo

● En aprilo Klubo Esperantista de Malmö festis sian 60-jaron. Festparolis senatano Einar Dahl kaj deklamis artistino de la Urba Teatro.

Vjetnamujo

● En oktobro 1965 vizitis Hanojon konata ĉina verkisto esperantisto Ba kim. Tie lin oficiale akceptis Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio.

Uberlândia, Brazilo, kie kunvenis la Unua Brazila Kongreso de Studantoj de Esperanto.



LAŬFAKE

Fervojo

● La 18-an kongreson de IFEF (Utrecht, Nederlando, majo) partoprenis fervojistoj el 18 landoj. Esperantlingve salutis la nederlanda subministro pri trafiko kaj akvoregulado, la prezidanto-direktoro de la Nederlandaj Fervojoj, la prezidanto de la fervoja sindikato, k.a. Raportis radio kaj ĵurnaloj.

Decidoj atingitaj: IFEF aliĝu al UEA, kaj la 19-a kaj 20-a kongresoj okazu en Fulda, Germanujo, kaj en Sofio, respektive.

Kino

● La esperantlingva fantascienca filmo "Inkubo" aperos ekde septembro 1966 en franca kinejo "d'Art et d'Essai".


● La ĉina filmo "Brila festotago" kun komentario en Esperanto (vidu januaro, p. 13) estas montrata en pariza kinejo kadre de la franca-ĉinaj kultur-interŝanĝoj.

Lernejoj

● Laŭ statistiko de IKUE en Usono, almenaŭ 12 katolikaj lernejoj en Usono kaj Kanado enkondukis kursojn de Esperanto de post novembro 1964. La nombro de gelernantoj estas minimume 180 entute.

Religio

● En aŭdienco de 21 aprilo 1966 la Papo konsentis, "ke la Unuiĝo de la Katolikaj Esperantistoj, okaze de kunvenoj kaj kongresoj, uzu Esperanton en la legaĵoj kaj en la fidelulara preĝo de la Meso." Ĉar la novaj leĝoj pri la liturgio koncernas ĝuste la naciajn (sed ne internacian) lingvojn, necesis aparta papa decido.



LA JUNA VIVO

**Oficiala organo de
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
H. Bakker, Kastelenstraat 231,
Amsterdam Z, Nederlando**

RAPORTO PRI "SEMINARIO POR LA GVIDANTOJ DE ESPERANTO-MOVADO"

Japana Esp-ista Junulara Organizo (JEJO) organizis laŭ la laborplanoj de 1966 "Seminarion por la Gvidantoj de Esperanto-movado" en Japanujo, 3 tagojn de 29/IV ĝis 1/V en la Junulara Domo de Sizuoka. Tiuspeca seminario okazis por la unua fojo, kio altiris la intereson de multaj gvidantoj en la loka Esperanto-movado kaj venigis entute 40 partoprenantojn, inkluzive de deko da malnovaj aktivuloj.

La programo de la seminario konsistis el 5 prelegoj kaj diskutado pri la diversaj problemoj en la movado. Prelegoj: 1) "Enkonduko al Gramatiko de Esperanto" (de s-ro Ŝihej Mijake, ĝen. sekr. de Japana Esp-Instituto), 2) "Lingvo kaj Vivo" (surbaze de la samtitola verko de Waringhien, de s-ro Michael Lamb, studento en la Universitato de Tokio), 3) "Pri Instrumeto kaj sukcesigo de Esperanto-kursoj" (de s-ro Kikunobu Matuba, lingva komisionano de JEI), 4) "Historio de Japana Esp-Instituto kun ĝenerala historia fono de japana E-movado" (de s-ro Ŝ. Mijake), kaj 5) "Por la disvastigo de Esperanto" (de s-ro Yoshimi Umeda, prezidanto de JEJO).

La diskutado daŭris entute 7 horojn, po 2-3 ĉiutage, pri la jenaj temoj: a) Perspektivo de la Japana Esperanto-movado; b) Pri administrado kaj sukcesaj aranĝoj de la lokaj grupoj; kaj c) La rolo de la Internacia Lingvo en la kulturaj kampoj de la mondo.

En la seminario evidentiĝis la fakto, ke la japana Esperanto-movado jam havas bonajn kaj kompetentajn gvidantojn inter la juna generacio, kiuj en multaj partoj de la lando jam aktivas transprenante la laborojn de la malnovaj gvidantoj.

Y. U.

PATRONAJ MEMBROJ

Ni turnas nin al ĉiuj esperantistoj pli ol 25 jaraĵ, kiuj ne plu estas anoj de TEJO, sed deziras konkrete subteni la junularan Esperanto-movadon.

Sendube vi legis la Nefermitan Leteron en la maja numero de LJV (p. 94) pasintjare, per kiu ni atentigis pri la financa krizo de TEJO kaj alvokis la plenaĝulojn doni sian laŭpovan helpon. Intertempe alvenis pluraj vere utilaj donacoj kaj la unuaj, sed ne jam sufiĉaj, aliĝoj kiel Patrona Membro, kiun kategorion ni kreis antaŭ unu jaro.

Denove ni afable petas vin subteni la agadon de TEJO. Tion vi povas plej efike fari per donacoj kiel ankaŭ kiel Patrona Membro. Ni memorigas:

- Patrona Membro A pagas 16 ned. gld. (64 stelojn) kaj ricevas (a) la revuon "Kontakto" kaj (b) materialojn pri TEJO;
- Patrona Membro B pagas 5 ned. gld. (20 stelojn) kaj ricevas laŭdezire regulajn informojn pri la aktiveco de TEJO.

Viajn kontribuojn vi prefere sendu al la CO de UEA aŭ al ĝiaj landaj perantoj. Koran dankon!

Estraro de TEJO

NEKROLOGO

La 21-an de aprilo mortis en Limmen, Nederlando, s-ino E. van Veenendaal-Bouwes, la fondinto kaj honora prezidantino de la Tutmonda Esp. Junulara Organizo. Ŝi fariĝis 68-jara. S-ino van Veenendaal tre amis la junularon kaj dediĉis preskaŭ sian tutan vivon al ĝi. Jam en 1934 ŝi fondis la porjunularan gazeton "La Juna Vivo" kaj redaktis ĝin dum multaj jaroj. Dum siaj lastaj vivojaroj, kvankam malsana kaj malforta, ŝi verkis libreton pri la historio de TEJO. Ŝiaj optimismo kaj organiza kapablo estis modelaj, kaj ŝi neniun laboron preterlasis por akceli la evoluon de la junulara organizo.

Ŝia dua granda amo estis la ideo pri homaranismo kaj la "interna ideo"; multajn leterojn kaj cirkulerojn ŝi dissendis por disvastigi la zamenhofajn pensojn.

Kvankam ŝia lernolibreto "La Juna Vivo" eldoniĝis en pli ol 15.000 ekz. antaŭ la dua mondmilito, ĝi estas ankoraŭ ĉiam aktuala.

Ne nur ŝiaj filino kaj genepoj, sed la tuta esperantistaro funebras la morton de tiu ĉi nobla virino.

E. Burgler-Jezsó

Somereca bildkarto

atestis ekskurson de 18 sudfrancaj gejunuloj sub gvido de Claude Nourmont, al la montaro Ste Victoire.

Aliaj francaj novaĵoj:

Responde al legantoj, jen titoloj de la revuoj kie aperas novaĵoj per kaj pri Esperanto: Biggles, Commando, Clapotis, Jacques Rogy, Johnny Speed, Olympic, Ray Halcotan, Tarou, Temeraire, Tex Bill, Vigor.

Post restado en Grésillon entuziasme raportis Danielle Cluzet el Calais. Ŝiaj impresoj aperis kun du fotoj en la gazeto "Nord Littoral".

Junaj poetoj kunlaboras al la revuo "Elan" (eld. L. Lippens, 59 Linselles) kiu havas paĝon pri Esperanto.

(inf. L. Giloteaux)


Ciujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75-PARIS 16, Francujo. En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Por aliaj horsistemoj vidu la jarlibron 1966, 1-a parto, p. 170. Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.



Ciutage	15.30-16.00	Warszawa, 50.42m. (5950 kcs), 48.90m. (6135 kcs), 42.11m. (7125 kcs), 41.99m. (7145 kcs), 41.18m. (7285 kcs), 31.01m. (9675 kcs). P. Pola Radio, Esperantaj disaŭdigoj, Warszawa.
	19.30-19.45	Budapest, 240 m (1250 kcs), 48.10 m (6234 kcs), 41.58 m (7220 kcs). I.P. Radio Budapest, Esperanto dissendoj, Budapest VIII, Hungarujo.
Dimanĉo	11.00-11.30	Pekino, 48m, 41m. I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino. Ĉinujo.
	12.30-13.00	Pekino, 30m, 25m. I.
	20.05-20.30	Sofia, 50.68 m (5920 kcs), 25.61 m (11715 kcs). P. Radio Sofia, Bulgarujo.
	21.30-21.45	Teresina, 210m. (1430 kcs), 88.63m. (3385 kcs). I. P. Radio Clube de Teresina, Rua Barroso 175, Teresina (Piauí), Brazilo.
	23.30-23.55	Sofia, 50.68 m (5920 kcs), 41.35 m (7255 kcs). P.
Lundo	00.15-00.45	Muritiba, 216m. (1390 kcs), I.K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.
	12.00-12.10	Bern, 48.66m. (6165 kcs), 31.46m. (9535 kcs), 19.60m. (15305 kcs), 13.94m. (21520 kcs). P. (D-ro A. Baur). Svisa Radio, S.O.C. Bern-16, Svislando.
	21.35-21.50	Madrid, 88.8mcs (M.F.) K. Radio Juventud de España, Poŝtkesto 6092, Madrid (Hispanujo).
	22.40-22.55	Hilversum, 298m. (1007 kcs) aŭ 402m. (746 kcs). P., N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).
	22.45-23.00	Valencia, 278m. (1079 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
Mardo	16.50-17.00	Wien, 577m. (520 kcs), 514m. (584 kcs), 293m. (1025 kcs), 25.45m. (11785 kcs), 16.78m. (17880 kcs). P. Radio Wien Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
Merkredo	6.45- 7.00	Gdańsk, 230m. (1304 kcs). I. Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdańsk, Poll.
	12.00-12.10	Bern, Kiel lunde. (S-ro C. Gacond).
	18.45-19.00	Resende, 196m. (1530 kcs). P. Radio Agulhas Negras ZYP 22, Praça Oliveira Botelho, Resende (Rio de Janeiro), Brazilo.
	21.35-21.50	Madrid. Kiel lunde.
	23.30-23.55	Bilbao, 212m. (1412 kcs). I. P. Radio Bilbao, Apartado 1117, Hisp.
Ĵaŭdo	8.30- 8.40	Wellington, 49.34m. (6080 kcs), 31.45m. (9540 kcs). I. Radio New Zealand, P.O. Box 2396, Wellington C.1, Nov-Zelando. (nur la lastan ĵaŭdon de ĉiu monato).
	11.30-11.40	Wellington. Ripeto de la programo.
	17.50-18.00	Praha, 233m. (1286 kcs). I. Radio Praha, Disaŭdigoj por Aŭstrujo, Praha, Ĉeĥoslovakujo (ĉiun alternan ĵaŭdon).
	21.15-21.25	Bern, 48.66m. (6165 kcs), 31.46m. (9535 kcs), 19.60m. (15305 kcs). P. (D-ro Baur).
	23.05-23.20	Zagreb, 264m. (1133 kcs). P. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
	23.05-23.20	Beograd, 439m. (683 kcs), 48.78m. (6150 kcs). P. (programo de Zagreb).
Vendredo	20.00-20.30	Pekino, 48m, 42m. I.
	21.35-21.50	Madrid. Kiel lunde.
	22.45-22.55	Hilversum, 298m. (1007 kcs) aŭ 402m. (746 kcs), P., V.A.R.A., Poŝtkesto 175, Hilversum, Nederlando.
Sabato	11.00-11.30	Pekino, kiel dimanĉe.
	12.30-13.00	Pekino, kiel dimanĉe.
	16.00-16.30	Guatemala, 220m. (1360 kcs), 48.54m. (6180 kcs). I.K. La Voz de Guatemala Guatemala Cd., Mezameriko.
	16.35-16.50	Roma, 30.90m. (9710 kcs), 25.20m. (11905 kcs). P. Radio Roma, Esperanto-fako, Casella postale 320, Roma, Italujo.
	20.00-20.30	Pekino. Kiel vendrede.
	21.15-21.25	Bern. Kiel ĵaŭde (S-ro C. Gacond).
	22.00-22.30	Uberlândia 191m. (1570 kcs), I.K. Rádio Cultura de Uberlândia, Minas Gerais, Brazilo.

ATENTU KONGRESANOJ BUDAPEST ! Pro lastmomenta ŝanĝo de Inaŭgurejo ĉiuj kongresanoj senescepte povos ĉeesti la Inaŭguron de la 51-a UK. Antaŭaj avizoj pri limigita partopreno en la Inaŭguro ne plu validas.

esperanto
juli-aŭg. 1966



AL ISRAELO EN 1967 !

Sur la foto: regiono de bibliepokaj kuprominoj ĉe la Akaba golfo.

EN LA GRUPOJ


Jen kelkaj sugestoj por agado de lokaj grupoj en la venontaj monatoj:

1. *Senprokraste forsendi al la C.O.* ĉiujn kolektitajn subskribojn por la Propono al UN (vidu p. 127).

2. *Nepre aranĝi festan kunvenon* pro la 20-a datreveno de Unesko je la 4-a de novembro aŭ proksima dato, eventuale kombine kun la Tago de Unuiĝintaj Nacioj (24 oktobro). Peti materialojn de la Nacia Unesko-Komisiono. Alia fonto: "Paco", ĉeĥoslovaka eldono, n-ro 148, p. 12-14.

3. *Aranĝi informan vesperon pri Israelo* anticipe al la 51-a UK en Tel Aviv, 2-9 aŭgusto 1967. Materialojn peti de israela ambasadorejo aŭ turisma oficejo. Vidu ankaŭ junio, p. 116-7.

oficiala informilo
n-ro 392, 1 junio 1966



RAPIDA KRESKO DE KOSTOJ EN NEDERLANDO

La apuda grafikaĵo, aperinta en nederlanda ĵurnalo, klare montras la rapidegan altiĝon de afrankotarifoj de post la milito. Ĝi montras la tarifojn por enlandaj leteroj, poŝtkartoj kaj presaĵoj. Precipe tiu lasta grave influas la buĝeton de UEA. Kiel oni vidas, la presaĵa tarifo almenaŭ dekobligis. Grafikaĵo pri la tarifoj por eksterlando montrus similan kreskadon.

MEMORIGA KALENDARO

Julio

17-24 Int. FERIAJ Kursoj, Helsingør, Dan.
19-23 Hispana Kongreso en Bilbao
21-24 14-a Kongreso de ELNA, Washington D.C.
21-27 IKUE-Kongreso en St. Gallen, Svisujo
23-24 Aŭstria Esperanto-Konferenco, Graz
23-28 Dua Lerneja Konferenco, Graz, Aŭstrujo
23-30 22-a IJK de TEJO, Pécs, Hungarujo
KELI-Kongreso, Debrecen, Hungarujo
SAT-Kongreso, Swanwick, Britujo
26-30 Ferioj de AEF en Klosterneuburg
27-29 Oficialaj antaŭkongresaj tagoj, Debrecen
30-5/8 Postkongreso SAT-Junularo, Bamford, Brit.
30-6/8 51-a Universala Kongreso en Budapeŝto
10-a Int. Infankongreseto, Budapeŝto

Aŭgusto

7-9 Oficiala Postkongreso en Szeged
7-10 Int. Renkontiĝo, Szolnok, Hungarujo
7-13 Naturamika rondvojaĝo tra Aŭstrujo
10-13 FERIAJ tagoj en Ljubljana, Jugoslavio
10-17 STELO-kongreso, Ruse, Bulgarujo
10-20 Int. Pedagogia Seminario, Szeged, Hung.
14-22 Int. Ferio-semajno Krommenie, Ned.

Septembro

3 Sezono en Grésillon finiĝas
4-10 Eŭropa Ferio-Semajno, Boldern, Svisujo.

Oktobro

24 Tago de Unuiĝintaj Nacioj
24-30/11 Ĝen. Konf. Unesko, Parizo

Decembro

10 Tago de Homaj Rajtoj
15 Zamenhof-Tago, Libro-Tago
17 Meksika Kongreso, Meksikurbo
27-2/1 10-a Int. Sem. GEJ, Münster
31 Kongreskotizoj Tel Aviv plialtiĝas

Februaro

11-25 Skirestadoj en Krimml, Aŭstrujo

VIZITANTOJ AL LA C.O.

La C.O. volonte akceptas vizitantojn por montri al ili la propran domon de la Asocio kaj la funkciadon de la laboroj. Ili venu prefere inter la 13-a kaj 14-a horoj aŭ inter la 17-a kaj 18-a. Ili ne forgesu, ke la geoficistoj ĉiam havas multe da laboro, kaj ili do ne restu pli ol duonan horon, se ili ne havas iun specialan temon por pritrakti.

NOVAJ DELEGITOJ

Aŭstralio

Canberra FD (Komerco): N. Gamble, 11 Lamington Street, Deakin, A.C.T.; tel. 813813.
Moree FD (Rotario): la D.
Picton (NSW) 11 000. D: A. Towsey, 1 Antill St.; tel. 7 1576.

Brazilo

Além Paraíba (MG) 32 000. D: Maurício Santiago Couto, R. José Mercadante 90, Pôrto Nôvo; tel. 557.
Belém (Pará) 400 000. FD (Skoltismo): Euclides Caripuna Soares, Av. Almirante Tamandaré 979; tel. 3297 (oficejo).

esperanto
juli-aŭg. 1966

Rio de Janeiro FD (Instruado) & (Religio: evangelia kristanismo): Jair Salles, Rua Visc. Sta. Isabel 469, Apt. 101, Grajaú; tel. 32-5374. FD (Radio): S-ino Clelia dos Santos Kozlovski, Rua Eleone de Almeida 10, ap. 201, Catumbi; tel. 42.0605.

São Miguel Paulista (São Paulo) 80 000. D: José Martins Coelho, Estrada de São Miguel 9086, C.P. 100.

FD (Religio: spiritismo): João Rêgo Serpa, Rua dos Gerânios 5, C.P. 53.

São Paulo. FD (Historio: brazila): Antônio Carlos Busato, Rua Dona Veridiana 100, apt. 73, 3a ZP.

Britujo

Dunfermline (Fife) 50 000. D: W. Clarke, 9 Howard Crescent.

Walton-on-Thames (Surrey) 47 000. D: J.Ll. Ford, 21 Priory Close; tel. 29781.

Bulgarujo

Ruse D & JD: S-ino Maria Preslavska, Str. Botev 17.

Ĉeĥoslovakio

Bratislava D: Pavel Rosa, Vlčková 46. FD (Turismo): S-ino Olžbeta Mahrová, Malínovského 29.

Brno FD (Bibliotekoj): Zdeněk Hršel, Vsetinská 8.

Piesok-Podbrezová (Slovensko) 8 000. D: Vlastimil Nekuda, E blok; tel. 534.

Rimavská Sobota (Slovensko) 13 000. D: Karol L. Cibur, ulica Jánošíkova 12.

Francujo

Aubenas FD (Turismo): la FD (Asekuro).

72-Saint-Saturnin (Sarthe) 500 FD (P.T.T.): Marcel Bodereau.

59-Valenciennes (Nord) 47 000. D: Marcel Ligot, 6 rue Dadier; tel. 46-58-23.

Germanujo

Edenkoben (Rheinland-Pfalz) 7 000. D. & FD (Vinkulturo): Anton Kiefer, 6732 Edenkoben, Bahnhofstrasse 154; tel. 782.

7920 Heidenheim (Württemberg) 50 000. D: Siegfried Schlumberger, Neuffenstr. 7; tel. (07321) 23504.

454 Lengerich 22 000. D: Gerd Brinkmann, Im Hook 23; tel. 2274.

6735 Maikammer (Rheinland-Pfalz) 4 000. D: Alois Hans, Blumenstr. 7.

668 Neunkirchen (Saarland) 45 000. D: Heinz-Dieter Maas, Mess-str. 37; tel. 3509.

6652 Oberbexbach (Saarland) 4 500. D: Paul Schunck, Jägersburger Str. 16.

Stuttgart FD (Asekuro: fervoja kaj sociala): Egon Kiefer, 7 Stuttgart-Bad Cannstatt, Winterhaldenstr. 53.

Norvegujo

Oslo FD (Fervoj): John Moe, Gimlevn. 23, Jar; tel. 536893.

Nov-Zelando

Lower Hutt FD (Literaturo): Bertram Potts, 176 Cambridge Terrace; tel. 66-700 (4111).

Whangarei VD & FD (Turismo): S-ino M. Morrison, 27 Norfolk St.; tel. 88202.

Pollando

Przemyśl (woj. Rzeszów) 41 000. D: Wilhelm Sochatyński, ul. Jagiellońska Nr. 12.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Larrad, f-ino Mary, Manchester, Britujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1966

317 Leitão, f-ino Carolina Maia; 318 Souza, s-ro João Bat. de Melo e, Brazilo. 319 Schleicher, s-ro Ib, Danlando. 320 Beaucaire, s-ro Louis; 321 Grundhoff, s-ro J.; 322 Hilland, s-ro Josef; 323 Scheer, s-ro Walter; 324 Schumacher, s-ro F.; 325 Schumacher, f-ino Margarete; 326 Volk, s-ro Friedrich; 327 Wuenschel, s-ro H. P., Germanujo. 328 Pacelli, prof. Giuseppe, Italujo. 329 Cool, ing. G. F.; 330 Muller, s-ro J. L., Nederlando. 331 Andreasson, s-ro B.; 332 Carrfors, s-ino Solvig; 333 Colliander, s-ino M.; 334 Eklund, s-ro Oscar; 335 Håkansson, s-ro H.; 336 Hertzman, s-ro Anders; 337 Johansson, f-ino Ethel; 338 Johansson, s-ro Nils; 339 Johnsson, s-ino Margareta; 340 Leijder, s-ro Hj. Alderin; 341 Lokna, s-ro J.; 342 Sedendahl, ing. B; 343 Stenström, f-ino Signe; 344 Stridell, s-ro Kaj, Svedujo. 345 Nace, s-ro Paul E., Usono.

DONACOJ POR GENERALA KASO (Gld.)

Nederlando: Moerbeek, s-ro R., 100,—. Usono: Docal, s-ro S., 7,—.

POR VASTIGO DE LA AGADO (JARO DE INTERNACIA KUNLABORO, JARO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO) (Gld.)

Aŭstrujo: Rentmeister, s-ro F., 2,99. Nederlando: Verloren van Themaat, d-ro W., 15,—. Svedujo: Bengtsson, s-ro Karl, 27,78.

FONDAJO CANUTO

Finnlando: Väisälä, prof. Vilho: 5 MA; N.N.: 1 MA-K, 2 J-MA. Nederlando: Moerbeek, s-ro R.: 10 MA.

Ĉiu kontribuu por helpi la esperantistojn en landoj kun malforta valuto omaĝe al la prezidinto de UEA, prof. d-ro Giorgio Canuto. En tiu ĉi jaro la Fondaĵo estas uzata ĉefe por pagi kotizojn de sindonaj novaj esperantistoj en Azio kaj Afriko.

FONDAJO AZIO-AFRIKO (Gld.)

Svedujo: Edler, s-ro Per, 13,—.

DONACO POR TEJO (Gld.)

Nederlando: Moerbeek, s-ro R., 100,—.

PATRONAJ MEMBROJ DE TEJO 1966

(Vidu "Esperanto", februaro, p. 36)

A. (16,— gld.): 18. Becker, s-ro G., Germanujo; 19. Braun, d-ro A., Svislando.

FONDAJO JUNULARA GAZETO (Gld.)

S-ro E. S., 35,95. Britujo: Casey, s-ro J., 50,—. Germanujo: Richter, s-ro E., 7,20.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

esperanto
juli-aŭg. 1966

stato je la 31-a de majo

Konkurso I

Lando		kvoto	poentoj	%
1.	Hispanujo	2860	3085	107,87
2. (8)	Svedujo	7180	6275	87,40
3. (2)	Britujo	6691	5844	87,34
4. (3)	Francujo	7752	6511	83,99
5. (4)	Danlando	3099	2545	82,12
6. (5)	Usono	4526	3590	79,32
7. (6)	Finnlando	3160	2440	77,22
8. (7)	Italujo	4253	3175	74,65
9.	Svislando	2459	1725	70,15
10.	Belgujo	2055	1400	68,13
11.	Nederlando	5975	3803	63,65
12. (13)	Germanujo	7221	4280	59,27
13. (12)	Japanujo	3965	2180	54,98
14.	Brazilo	4142	2244	54,18
15.	Jugoslavio	5560	1815	32,64

Konkurso II

1. (6)	Israelo	460	510	110,87
2. (1)	Kanado	842	810	96,20
3. (2)	Sudafriko	250	240	96,—
4. (5)	Grekujo	270	256	94,81
5. (3)	Aŭstralio	1475	1310	88,81
6. (4)	Aŭstrujo	1475	1230	83,39
7.	Novzelando	1481	1000	67,52
8. (10)	Argentino	905	530	58,56
9.	Islando	250	135	54,—
10. (8)	Norvegujo	1755	930	52,99
11.	Madagaskaro	250	30	12,—

(Vidu la regulojn sur paĝo 39. Interkrampaj ciferoj indikas pasintmonatajn poziciojn.)

ANONCETOJ

La sekreto de feliĉa vivo, vi kaj viaj ĝin trovos en "Monoteismo kaj Pozitiva Moralo". Emilo Gasse. Ĉe UEA kaj ceteraj libroservoj. Gld. 4,40 (st. 17,60).

Filatelisto deziras interŝanĝi p.m. kun ĉiuj landoj - kontraŭ 100/200 diversaj, sendas samon el Francujo. S-ro R. Melo, La Gillière, F-42-Terrenoire, Francujo.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, F-63-Clermont-Fd., Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

1066 — Batalo de Hastings. 1966 — Amuzaĵoj Bona marborda libertempo: samtempe lernu la anglan lingvon. Skribu al s-ino V. Bateman, "Croft House", The Croft, Hastings, Sussex, Anglujo.

Kunlaborantoj petataj el ĉiuj landoj por interŝanĝi unuataĝajn kovertojn (dek aŭ pli) aŭ kontraŭ belaj hindaj poŝtmarkoj; reciproka rekompenco laŭbezzone. Esperanta Filatela Servo, P.O. Box 604, New Delhi, Hindujo.

Ĉu movo aŭ kombino de movo povas havi ideojn, intencon aŭ volon? Se tio ne estas ebla, do troviĝas ĉe la organismo iu ekstermateria elemento, kiu havas la kapablon sperti. Petu senpagan ilustritan faldprospekton ĉe Martinus-Instituto, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F., Danlando.

Peeter Anso, Tartu, Kastani 24-1, Estonio Sovetunio, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun afrikaj, aziaj landoj.

Kolorajn bildkartojn interŝanĝas en luksa kvalito: Ladislao Molnár, Székesfehérvár, Árpád fürdő, Hungarujo.

Interstene korespondadi kun pli aĝaj personoj el la tuta mondo pri seriozaj temoj (filoz., sociolog., polit., lingvo, vegetar.) deziras konstante Tomo Gregurek, Starogradska 22, Koprivnica, Jugoslavio.

Mezaĝa dommastrino deziras korespondantinojn en malproksimaj lokoj. S-ino Salmon, 2 Walwick Rd., Wellfield, Whitley Bay, North-umberland, Britujo.

Nova adreso Humphrey Tonkin: Ĝis 1 aŭgusto provizore: 7 Granny's Lane, Perranporth, Cornwall, Britujo. Poste: Dept. of English, University of Pennsylvania, Philadelphia, Pa. 19104, Usono. Korespondpetoj netraktataj.

La du plej grandaj vesperjurnaloj de Svedujo publikigas senpage korespondpetojn rekte senditajn de eksterlandanoj. Expressen, Box 341, Stockholm 7; Aftonbladet, Box 157, Stockholm 7.

Al la kongreso en Budapeŝto per fervoja rondo-vojaĝbileto tra Okcident-Germanujo (1450 km nur 100 gmk.). Informojn donos: Werner Dickel, 4628 Lünen, Münsterstr. 54.

Kontakton serĉas kun interesuloj por fari biodinamikajn kolektivojn. Harry Kortsen, Grundfør, pr. Hinnerup, Danlando.

Eŭropa Feria Semajno en Svislando, 4. - 10. septembro 1966. Petu la programon, aldonante rpk. S-ro Hunkeler Hans, poŝtfako 417, CH-5001 Aarau, Svislando.

Ĉu vi preparas feriojn en Skandinavio? Se vi vizitos la orientan bordon svedan, eble ankaŭ la Baltajn insulojn Öland kaj Gotland, ne hezitu kontakti la Esperanto-societon en Kalmar. Kaptu la okazon vidi tiun belan, historie faman urbeton helpe de la lokaj samideanoj.

Kalmar Esperanto-Förening. Prezid. Nils Kindgren, Vintergat. 8 A, Kalmar. Svedujo. Telefono: 0480-11506.

Delegito de UEA: Tore Johansson, Silkeborgsgat. 7 C, Kalmar. Svedujo. Telefono: 0480-14537.

GRAVA ATENTIGO

Pluraj oficistoj de la Centra Oficejo forestos dum la fino de julio kaj unua duono de aŭgusto pro la Universala Kongreso kaj pro libertempoj. Pro tio bv. prefere ne skribi al la Centra Oficejo dum la menciita periodo.

DANTE ALIGHIERI :

La Dia Komedio

Serio Oriento-Okcidento, speciala eldono



Tradukis Giovanni Peterlongo

Ilustraĵoj de Botticelli

Paralelaj tekstoj itala kaj Esperanta

Detala komentario

Prezo: 36,— gld. (144 st.)

Sola vendrajto por la Esperanto-Movado:
UEA

FERVOJA TERMINARETO

germana/esperanta - esperanta/germana

de Gernot Ritterspach

Gvidanto de la Terminara Komisiono de la
Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF)
80 paĝoj; 11,4 x 16,2 cm 2 000 terminoj

Eldonis:

Germana Esperanta Fervojista Asocio

Mendu ĉe: S-ino Elisabeth Ritterspach,
607 Langen, Berliner Allee 1, Germanio
Poŝtĉekkonto 2765 31 Frankfurt

Prezo: 6,50 DM + 10 % por afranko

Geedziĝo:

La 14-an de Julio 1966 geedziĝos en Krommenie,
Nederlando,

Cor Steenberg kaj Toos de Groot

Apeldoorn: Langeweg 35

Brunssum: Prins Hendriklaan 173

Estonta adreso: "Unueco"

Witte Kruisweg 2

Beekbergen (Nederlando)

Ĉu vi serĉas revuon

*kiu enhavas interesajn artikolojn pri
popularaj temoj,*

kun grandformataj trafaj ilustraĵoj,

kiu vere "instruas kaj amuzas" ?

Do vi bezonas la monatan bildrevuon

LA PRAKTIKO

*La administra maŝino de Universala Espe-
ranto-Asocio kaj la redaktado de*

*Wilhelm Schmid garantias regulan, akuratan
aperadon kaj aktualan enhavon.*


Jarabono 1966: 10,— gld. (40 steloj). Kotizu per
via kutima peranto, aŭ rekte al UEA.

**Okaze de la 150-a datreveno de la naskiĝo de
Mihail Lermontov, la granda majstro de la
rusa prozo, UEA eldonis ĉi tiujn elstarajn
rakontojn en la traduko de D. Staritsky.**

Kun bibliografio
de Lermontovaj
verkoj en
Esperanto

Moderna plasta
kovrilo

Prezo: 5,— gld.
(20 steloj)



**Per plumo samtempe ekscita, kortuŝa, ironia
kaj senspirige poezia, la aŭtoro vojaĝigas nin
kun juna rusa oficiro, laca pri la vivo kaj
kroĉiganta al la iluzia feliĉo de fortaj sensaĵoj.**

Unu el la **plej malnovaj** Esperanto-revuoj estas

espero katolika

(fondita en 1903)

Sed ne la **plej malmoderna**. Male:

ESPERO KATOLIKA

- aperas ĉiumonate
- kun varia enhavo
- kaj multaj ilustraĵoj
- sur 12 grandformataj paĝoj
- por nur 13.— svisaj frankoj jare!

Serioza, aktuala kaj interesa revuo, voĉo de katolikismo kaj organo de

**INTERNACIA KATOLIKA UNUIGO
ESPERANTISTA**

Centra Oficejo de IKUE
CH 9106 Zürcherhöhe AR, Svislando

LA REVUO (NE NUR) POR KATOLIKOJ!

LA NAŬZO

bind.
14,10 gld.
56,40 st.



broŝ.
11,70 gld.
46,80 st.

222 p.
15 × 21

222 p.
15 × 21

la obseda romano de

Jean-Paul Sartre

intimaj pensoj de neordinara menso
la unua okcidenta verko en la serio

ORIENTO-OKCIDENTO

Serio **ORIENTO-OKCIDENTO** n-ro 4

KALEVALA

la granda nacia eposo de la finnoj
verse tradukis J. E. Leppäkoski



368 paĝoj kun postprezento, lingvaj kaj ilustritaj etnografiaj klarigoj. Pli ol 100 vinjetoj kaj 1000 ornamaj komencliteroj de la fama finna artisto Axel Gallen-Kallela. Formato de "Naŭzo", "Malsata ŝtono" kaj "Rakontoj de Oogai".

Prezoj:

tuttele bind. 25,— gld (100 st)

Sola vendrajto ekster Skandinavio: UEA

"Reĝo Lear faras decidan antaŭpaŝon en la kampo de la viva dramo."

A. D. Foote en British Esperantist

"La fideleco, al kiu la tradukinto celis, estas plene atingita, kaj al tio nenio estas oferita el la majesta poezio de la originalo."

D. B. Gregor en Heroldo

"Neniu franca traduko povas atingi la altan gradon de ekzakteco trovebla ĉe la Kalocsay-a traduko."

Robert Martin en Franca Esperantisto

"Kalocsay pruvis ankoraŭfoje sian majstrecon. Mi havas la impreson, ke Reĝo Lear estas lia atuto."

William Auld en la revuo Esperanto

REĜO LEAR

Tolbindita: 16,50 gld.

Broŝurita: 14,— gld.